

EL POPOLO ĈINIO

中國新造

7

1998

ISSN 0032-4361

Saluton al UEA

Budhismo en Tibeto

Uzado de regeneraj energioj en Ĉinio



La suno leviganta

Foto de HU WEIBIAO

INTER NI

En tiu ĉi numero kelkaj artikoloj estas rekomendindaj:

“Por reformado kaj disvolviĝo”. Ĝi konigas planon de reformado kaj evoluo de Ĉinio en la venontaj 5 jaroj. En la pasintaj 20 jaroj, dank’ al reformado de ekonomia sistemo kaj malfermo al la ekstera mondo, okazis en Ĉinio pliboniĝo de popola vivo kaj progreso de ekonomio kaj socia civilizacio. Tamen estas nemalmultaj problemoj — la financa krizo en Azio, reformado de ŝtataj entreprenoj... Kiel la ĉina registaro plenumos sian taskon, oni atentigas.

“Printempo por maljunuloj”. Pro multiĝo de longvivuloj iuj ĉinaj urboj eniris socion de maljunuloj. Kvankam la maljunuloj ne havas problemojn pri nutrado kaj vestado, tamen ili ofte cerbumas pri tio, kiel pli bone pasigi la tempon. Administrantoj de loĝkvartaloj en multaj

ĉinaj urboj klopodas amuzi la maljunulojn per ludoj en kaj ekster kluboj. Grupoj kantaj, dancaj kaj sportaj estis fonditaj de la maljunuloj mem. La artikolo temas pri maljunaj modelinoj, kiuj rompis la tradician pensmanieron kaj bele prezentas vestojn sur scenejo.


“Budhismo en Tibeto”. Budhismo estas tre populara kaj influa en Ĉinio. Ne estas troigo diri, ke ĉie kaj ĉiam estas Budho en la Tibeta Aŭtonoma Regiono. La artikolo helpas vin informiĝi pri tio, kiam budhismo eniris Tibeton, pri ĝiaj trajtoj kaj ĝia nuna stato ktp.

En ĉinaj universitatoj Esperanto estas ofte instruata. Kvankam la kondiĉoj ne estas tre bonaj, tamen neniam mankas lernantoj, se estas E-kurso. Pri tio ni raportis de tempo al tempo. Ĉi-numere ni konigas E-instruadon en Shandong-universitato. La E-instruistoj ja faras laboron respektindan.

La Red.

El Popola Ĉinio

7 [478] 1998



Vilaĝo en printempo
Foto de LIU SIGONG

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Hou Zhiping

Adreso: P. O. Kesto 77,
Beijing 100037, Ĉinio


Telefono kaj telefakso:
+86-10-6832 1808

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/elpopolacxinio>>

ENĤA VOJO

- | | | | |
|----|---|----|---|
| 2 | INTER NI | 29 | LAŬ LA SILKA VOJO: |
| 4 | Uzado de regeneraj energioj en Ĉinio | | Senfina vojo |
| 6 | EKONOMIE: | 36 | ĈINA KULTURO: |
| | Por reformado kaj disvolviĝo; Kurantaj aferoj | | La ĉielo en la okuloj de antikvaj ĉinoj (I) |
| 8 | Esperanto en koncertejo | 38 | ORDINARAJ ĈINOJ: |
| 9 | Esperanto-instruado en Shandong-universitato | | Surdmuta amanto de pekina opero |
| 10 | ORIGINALE VERKITAJ: | 40 | JUNULARO: |
| | Du humuraĵoj | | Vivo estas en alia loko |
| 11 | POR KOMENCANTOJ: | 42 | Flegistino Zou Ruifang |
| | Hundido kaj akvo | 44 | EL ĈINAJ GAZETOJ |
| 12 | SUR NIA LIBROBRETO: | 45 | KORESPONDI DEZIRAS |
| | Pri "Ruĝdoma Songo" | 46 | Printempo por maljunuloj |
| 13 | ESP-NOVAĴOJ | 48 | Flora sezono en Kunming |
| 14 | Deziro de edzino (Novelo) | 50 | POR VIA SANO: |
| 16 | Budhismo en Tibeto | | Sanprotekto en somero |
| 20 | Dramo en Ĉinio | 51 | ĈINAJ METIARTAĴOJ: |
| 22 | lam dezerta monto verdigita | | Blu-porcelana kruĉo kun flora desegno |
| 24 | Familio de bronzaĵ-riparistoj | 2 | La suno leviĝanta |
| 25 | EN ĈINAJ URBETOJ: | | SUR LA DORSKOVRILO: |
| | Serpento-kultantoj | | [FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ] |
| 28 | Saluton al UEA | | "Kolorludo"; Sunfloroj |



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|--------------------|--------------------|
| 1. Kunming (p. 48) | 4. Pingyao (p. 44) |
| 2. Zhanghu (p. 25) | 5. Lijiang (p. 44) |
| 3. Jinan (p. 13) | |

Uzado de regeneraj energioj en Ĉinio

ĈINIO donas grandan atenton al ekspluatado kaj aplikado de regeneraj energioj kaj atingis certagradan sukceson.

En la 60-70-aj jaroj, pro manko de brulaĵoj kaj elektro la ĉinaj kamparanoj provis utiligi metanon kiel brulaĵon. Unu post alia ili fosis en sia korto metanejon, dezirante produkti metanon el la fermentinta pajlo kaj aliaj vegetaloj miksiĝintaj kun fekaĵo kaj urino. En Zhejiang kaj Guangxi la kamparanoj atingis certagradan sukceson. Mongolaj paŝtistoj penadis en elektroproduktado per ventforto; tibetanoj sur altebenaĵo boligis buter-teon per sunenergio; en la frosta nordoriento la kamparanoj utiligis sunenergieon...

De la 80-aj jaroj, en Ĉinio plue disvolviĝis ekspluatado kaj aplikado de regeneraj energioj, dank' al "ekzemplado de sinteza energia konstruo" kaj "kredito por speciala teknika reformado de kampara riĉfonto".

Nun en kamparo de norda Ĉinio bonvena estas forcejo, al kiu liveras varmon subtera metanejo kun varm-ŝanĝa sistemo. La metanejo konstruiĝis sub necesejo kaj porka stalo. Homa kaj besta fekaĵoj falas en la metanejon kaj estiĝas tri produktaĵoj: la metano estas uzata ne nur por kuirado sed ankaŭ por prilumado; la metan-feĉo estas bona sterko; la metan-likvaĵo uzeblas por akvumi legomojn kiel akvo kaj sterko. Uzo de metanejoj plimultigis enspezon de la kamparanoj.

Samtempe kun tio en suda Ĉinio furoras ekologia agrikultura modelo nome "porko-metano-fruktarto". Per metano ĝi kunligis brutobredadon kun fruktarta kulturado kaj greno-produktado. Krom lumigo, kuirado kaj sterkigo, la metanlikvaĵo povas esti uzata ankaŭ por infuzi grensemojn, akvumi fruktartojn, aŭ bredi porkojn.

De la modelo "porko-metano-fruktarto" la kamparanoj multe profitis. Ni prenu kiel ekzemplon 8-kubmetran metanejon, 4/15-hektaran fruktoĝardenon kaj stalon kun 8 porkoj: En ĉiu jaro ĝi povas ŝparigi 600 kilogramojn da brutonutraĵoj, 2 500 kilogramojn da brulligno, 100 kilovatt-horojn da elektro, 800 juanojn por sterko kaj insekticido en fruktoĝardeno, kaj la fruktoj pliproduktiĝas je 20%.

En la 90-aj jaroj la aplikado de regeneraj energioj en Ĉinio disvolviĝis de kamparo al urboj, de simpleco al ekologio-protekto kaj sinteza utiligo de energioj. Tio ankaŭ iniciatis disvolviĝon de ekipaĵa industrio de regeneraj energioj en urbo.

Pasintece, en urboj de norda Ĉinio aero estis serioze poluciita, precipe en vintro, pro bruligo de karboj. Nun en subtera etaĝo kun 300 kvadrataj metroj por iu nove konstruita loĝkvartalo, 45 maŝinoj direktitaj de komputero hejtis domojn de 50 mil kvadrataj metroj. Sur ekrano de la komputero videblas temperaturo en tiuj domoj. Kiam en la domoj regas difinita temperaturo, la komputero aŭtomate ĉesigas funkciadon de la



Alt-efika motoro funkciigata de metano farita de Zhejiang-universitato

maŝinoj; kiam la temperaturo estas malpli alta ol la difinita, la komputero tuj funkciigas la maŝinojn. La jara elspezo per tiu metodo estas nur kvarono de tiu per karboj. Do de kie venas la energio? Ĉar en longa tempo la tersurfaco akumulis grandan kvanton da suna energio. En la loko 1.5 metrojn profunda sub la tersurfaco la temperaturo estas 5-10°C, kaj ĝi estas pli alta en pli profunda loko.

La loĝ-koncentriĝo en la urboj estas pli taŭga por grandskale kaj sinteze apliki regenerajn energiojn. La ĉina energi-administra departemento faris sukcesan provadon en iuj urboj. Ekz., en suda Ĉinio oni uzas teknikon pri metano por trakti rubon kaj eluzitan akvon, samtempe grandaree aplikas sunenergion kaj grundan varmon. En multaj nove konstruitaj elementaj lernejoj de norda Ĉinio estas "sunaj ĉambroj" — varmokonservaj muroj kaj grandaj fenestroj anstataŭis tradicionan karbo-bruligan sistemon. Tio estas utila kaj al ŝparo de energio kaj al medi-protektado.

Tamen ĉio ĉi estas nur komenco. La ĉinaj

urboj, precipe grandaj kaj mezgrandaj, ankoraŭ estas postiĝintaj en aplikado de regeneraj energioj. Ja estas vere, ke en Ĉinio la venta, suna kaj aliaj regeneraj energioj estas riĉaj, tamen pro manko de perfekta tekniko, ankoraŭ ne kompletigis la produkta sistemo. Tiuokaze, Ĉinio sinsekve elmetis "Perspektivo de la ĉefaj teknikoj de regeneraj energioj" kaj koncernajn leĝojn kaj ekonomiajn principojn. Ĉinio tion faras ne nur por medi-protektado, sed ankaŭ kaj pli grave pro serioza manko de la energioj. Laŭ prognozo de statistika departemento, en la fino de tiu ĉi jarcento en Ĉinio mankos 50% de la bezonataj energioj. La ĉinaj urboj, kiuj konsumas 2/3 de la energioj de la lando, devas senprokraste ekspluati kaj apliki regenerajn energiojn.

"Skemo por disvolvi novajn kaj regenerajn energiojn de Ĉinio" farita en 1996 montras, ke en 2010, la ĉefaj teknikoj por utiligi regenerajn energiojn atingos la nivelon de certskala produktado. La skemo difinis konkretajn normojn por utiligi la malsamajn energiojn. ■



Por reformado kaj disvolviĝo

MARTE de la kuranta jaro okazis en Pekino la 9-a Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko, kiu aprobis la laborraporton de la ĉina registaro. Menciante la ĉinan ekonomion en la pasintaj 5 jaroj, la raporto konigas, ke en 1997 la totala enlanda produktovalor atingis 7 477.2 miliardojn da juanoj. Tio montras, ke en la pasintaj 5 jaroj la nacia ekonomio kreskis meznombre je 11% ĉiujare. Dank' al penado, malaperis la tro rapida disvolviĝo en iuj kampoj de ekonomio kaj granda inflacio en la ekonomia disvolviĝo. En 1997 la nacia ekonomio kreskis je 8.8% kaj la detalvenda prezaro kreskis je 0.8%. Tio jam ne vidiĝis en multaj jaroj.

Tamen la tasko de la nova ĉina registaro por akceli la ekonomian reformadon kaj socialisman modernigon restas tre malfacila.

En la gazetara konferenco la nova ĉefministro Zhu Rongji (Ĝu Ĵongĝji) resumis la taskojn de la venontaj 5 jaroj kiel la jenon.

Li diris, ke la financa krizo en la Sudorienta Azio serioze defias la ĉinan ekonomion, tial oni



Zhu Rongji en la gazetara konferenco

nepre devas garantii, ke en 1998 la ĉina ekonomio kreskos je 8%, la detalvenda prezaro de varoj levigis je malpli ol 3% kaj la ĉina mono RMB neniel devalutiĝos, ĉar tio rilatas ne nur al la disvolviĝo de Ĉinio, sed ankaŭ al la prospe-

ro kaj stabileco de la tuta Azio. Por atingi tiun ĉi celon nia ĉefa rimedo estas pliigi la enlandan bezonon. Pro nia sukceso en makroregulado kaj praktikado de la politiko modere streĉi la financon elspezon, ni bremsis la mon-emision kaj inflacion en la pasintaj jaroj, tial estas eble eksciti la enlandan bezonon per pli da financaj rimedoj, t.e. akceli la konstruadon de fervojoj, ŝoseoj, urboj kaj alt-teknikaj industrioj, protektadon de la medio kaj liveradon de akvo por kampoj, plifortigi la teknikan reformadon de la nunaj entreprenoj kaj ankaŭ konstrui loĝdomojn, ĉar tio estas tre forta faktoro por akceli la ĉinan ekonomion.

Krome, la ĉina registaro difinis ankaŭ la celojn por 3 problemoj, kiuj strikte rilatas al la ĉina ekonomio, t.e. en la daŭro de ĉ. 3 jaroj liberigi plejparton de la grandaj kaj mezgrandaj ŝtataj entreprenoj kun defecito el la

malfacilo kaj starigi sistemon de moderna entrepreno; en la daŭro de 3 jaroj komplete reformi la financon sistemon kaj simpligi la registaran strukturon de Ĉinio. La kongreso decidis redukti la nombron de la ĉinaj ministerioj de 40 al 29 kaj transpostenigi duonon de iliaj ŝtatoficistoj.

Menciante reformadon de la grandaj kaj mezgrandaj ŝtataj entreprenoj, ĉefministro Zhu diris, ke en Ĉinio estas 79 000 ŝtataj industriaj entreprenoj, sed 49% el ili suferas de deficino. Fakte, iuj deficitaj entreprenoj estas tre malgrandaj kaj havas ĉiu nur dekojn da laboristoj, dum dekono de la 500 grandaj ŝtataj entreprenoj, kies impostoj kaj profitoj konsistigas 85% de tiuj de la tuta lando, suferas de deficino. Tial, ĝenerale dirite, en la fino de la 20-a jc. eblos liberigi plejparton de la grandaj kaj mezgrandaj deficitaj entreprenoj el la malfacilo.

En la venontaj 5 jaroj la ĉina registaro faros pluan reformadon al la sistemoj de grena negoco, investo kaj prunto de kapitaloj,

loĝdomoj, kuraco kaj impostoj. Ĉefministro Zhu analizis, ke Ĉinio havis abundan rikolton de greno jam en 3 sinsekvaj jaroj kaj la kvanto de rezervita greno kreis rekordon, kaj eĉ se ĝi ree suferos de grandaj naturaj katastrofoj en la venontaj 2 jaroj, al ĝi ne mankos greno, sed pro la granda stoko la ĉina registaro devas pliigi sian financon subvencion, tial ĝi devas fari reformadon al la sistemo de aĉeto kaj vendo de greno.

Koncerne la investon kaj pronton de kapitaloj, oni faras ilin ĉefe per administra sankcio, kio ne povas disvolvi la fundamentan rolon de la merkato en dispozicio de riĉfontoj, kaj sekve de tio ripetiĝis superflua konstruado, tial oni devas fari radikalan reformadon, por ke ĝi konformu al la ekonomia disvolviĝo.

Konstruado de loĝdomoj estas nova akcelo por ekonomia disvolviĝo. Necesas ĉesigi la bonstatigan distribuon de loĝejoj kaj varigi la loĝejojn, por ke la loĝantoj mem aĉetu loĝejon. La nova projekto estis en preparado

jam pli ol 3 jarojn, kaj ni pretas praktiki ĝin en la lasta duono de la jaro.

Ĉefministro Zhu emfazis, ke la plej granda tasko de la nova registaro estas prosperigi la landon per sciencoj kaj edukado. La ĉina registaro alte taksas tiun problemon, tamen pro manko de mono ĝi ne bone plenumis la taskon. Por kio do elspeziĝis la mono? La registaraj organoj estis tro grandnombraj kaj multe da mono elspeziĝis por la salajrado, kaj plie, postulate de diversnivelaĵaj registaroj, ni faris blindan kaj superfluan konstruadon kaj elspezis kelke kaj eĉ dekojn da miliardoj da juanoj por konstrui entreprenon, sed konstruite, ĝi ne donis profiton, sed kolapsigis la antaŭan entreprenon, kaŭze de tio, kaj la financa ministerio kaj la banko de Ĉinio ne havas monon por sciencoj kaj edukado. La nuna registaro decidis simpligi siajn departementojn, transpostenigi duonon de siaj oficistoj kaj nuligi la superfluan konstruadon por havi pli da mono por realigi la celon. ■

KURANTAJ AFEROJ

● Ĉinaj agronomoj opinias, ke estos tute eble vivteni sin mem por la ĉina popolo en 2030, kiam la ĉina loĝantaro nombros 1.6 miliardojn, kondiĉe ke Ĉinio bone kulturos 66.7 milionojn da hektaroj da kampoj, kun produktokvanto de 15 tunoj da greno por ĉiu hektaro, kaj realigos serion da ŝlosilaj agrikulturaj teknikaj projektoj.

Ĉinio metas la atenton sur siajn proprajn fortojn por solvi la problemon de la grenaj bezono kaj livero, kaj samtempe prenas importadon de greno kiel necesan helpon, kiu ludas nur la rolon de ŝanĝo de grenaj specioj. Ĉinio ne multe dependas de la internacia grena merkato. Ĉinio importas malmulte da greno, tio neniel minacas la mondan merkaton de greno.

● Ĝis la fino de la kuranta jarcento Ĉinio lanĉos 10 diversspecajn satelitojn, kiaj la Satelito Riĉaĝo n-ro 1, kune elfarita de Ĉinio kaj Brazilo, kaj aliaj aplikaj satelitoj destinitaj por observi la teron, gvidi navigacion kaj lokalizon, malpliigi la gravecon de naturaj katastrofoj kaj fari scienc-teknikan eksperimenton.

Ĉinio lanĉos malgrandan lun-sondilon kaj elfaros alispecan kosmoaparaton surbaze de la sciencaj fruktoj de reprenebla satelito.

● Ĉinio elkulturis novan varion de kontraŭinsekta kotono. La kotonaj kapsulvermoj, kiujn ne povas mortigi insekticidoj, facile toksigas kaj mortas, se ili manĝas folion de tia kotono.

Tia kotono estas efika por rezisti kontraŭ la kotonaj kapsulvermoj, ostrinoj (*Ostrinia nubilalis*) kaj pektinoforoj (*Pectinophora gossypiella*). Ĝi estas neniom malutila al la malamikoj de la kapsulvermoj, sed male protektas ilin. Ĝi estas neniom malutila ankaŭ al la homoj kaj hejmobestoj. Pro tio multe malleviĝis la produktokosto de kotono.

● 12 grupoj faritaj de la Ŝipkonstrua Kompanio de Mitsui, Japanio, ekfunkciis en la internacia kontenerizita doko de Yantian, Shenzen-a Speciala Ekonomia Distrikto. Kun avangarda monitora sistemo ili estas utilaj por malpliigi perturbon kaj maŝin-halton, tial ĝi estas tre utila por garantii plej grandan produktivecon.

Tiu ĉi doko fariĝos la unua mondnivela haveno en suda Ĉinio.

Esperanto en koncentrejo

Forpasis en 1996 Franz Haiderer el Vieno, elstara esperantisto. En "Aŭstria Esperanto-Revuo" (1975-10-12) estis memorinda rakonto verkita de Franz Haiderer. Omaĝe al li, ni aperigas la rakonton mallongigitan laŭ la rekomendo de s-ino Carme Llapart el Hispanio.

La Red.

KIAM finiĝis la Hispana Civilmilito, kiam estis pereinta la demokrata respubliko en la jaro 1939, ni, batalintoj sur ĝia flanko, venis sur francan teritorion kaj tuj estis transportitaj en koncentrejojn. Mi ne volas rakonti pri la travivaĵoj en tieaj cirkonstancoj, sed deziras nur mencii tion, kio rilatas al la korsentoj de esperantisto, al nia ŝatata lingvo Esperanto. Kelkaj esperantistoj komencis serĉi inter miloj da koncentritoj samideanojn. Ni fondis viglan grupon, kiu atingis la nombron de 49 personoj el multaj nacioj. Ni skribis murgazeton por informi la neesperantistojn pri la Internacia Lingvo.

La sukceso baldaŭ montriĝis: en du kursoj ni povis instrui al 70 partoprenantoj. Post nelonga tempo ni ankaŭ havis kontakton kun francaj esperantistoj, kiuj nin subtenis per lernolibroj, kajeroj, kraĵoj kaj aliaĵoj.

La 1-an de majo 1941 venis grandega transporto el koncentrejo de Dachau en Bavario. Post kelka tempo, spertinte tie la

danĝeran vivon, ni komencis funkciigi Esperanto-grupon.

Inter ni ja estis sufiĉe granda nombro da aŭstriaj esperantistoj, kaj ni serĉis inter alinacianoj. Ni trovis esperantistojn el Polio, Germanio, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Sovetio kaj Nederlando. Konsistis tiu grupo el reprezentantoj de ĉiuj mondkonceptoj: komunistoj kaj socialistoj, katolikoj kaj mahometanoj iĝis fratoj, kaj nia solidara interhelpo ofte savis al ni la vivon. Kompreneble ni ne povis agi publike. Vespere post la laboro ni promenis inter la barakoj po du- aŭ triope, babilante kaj praktikante nian lingvon. Skribe ni produktis Esperantan Informilon, kiu pasis de mano al mano.

En la jaro 1945 venis granda transporto de alia koncentrejo evakuita pro la proksimiĝo de la orienta fronto.

Ni preparis afiŝon kaj fiksis ĝin sur unu el la barakoj, en kiuj oni loĝigos ilin. "ESPERANTISTOJ, RENKONTIĜU JE LA 19-A HORO ĈE BARAKO 81"

estis skribita.

Je la destinita horo ni atendis por renkonti la novulojn, sed neniu venis. Nur konataj vizaĝoj de kelkaj samideanoj nesuspektige ĉirkaŭrigardis.

Subite venis SS-ulo* kaj demandis en la bona Zamenhofa lingvo: "Kiu parolas la lingvon Esperanto?" Kuraĝe mi proksimiĝis al li kaj diris duone germane, duone Esperante: "Jawohl, Herr Hauptsturmführer, mi parolas Esperanton!" Li fortiris min plurajn paŝojn kaj diris: "Trairante la barakon, mi trovis la afiŝon. Ĝoju ke mi vidis tiun afiŝon. Se alia SS-ulo estus trovinta ĝin, mi ne scius kio estos okazinta. Gardu vin estonte kaj laboru pli kaŝe. Mi estis ano de la Esperanto-grupo en Nürnberg antaŭ 1933."

Li foriris, kaj mi ne plu vidis lin. Tiuj epizodoj pruvas ke ankaŭ en danĝera kaj malhumana epoko oni povas esti fidela al noblaj idealoj. ■

* Politika policano de Hitler.

Esperanto-instruado en Shandong-universitato

EN 1901 fondiĝis Shandong-universitato en fama kultura urbo Jinan, ĉefurbo de Shandong-provinco. En la 30-aj jaroj iuj samideanoj esperantumis en la universitato. Poste, dum longa tempo E-movado silentis tie. En 1982, kiam ĝi prosperis en Ĉinio, mi, fininte mian E-lernadon en la Unua E-kurso por Instruistoj de Ĉinaj Altlernejoj, gvidis E-kurson en la universitato.

Avidaj pri scioj kaj sopiremaj al ekstera mondo, multaj studentoj sin anoncis al la E-kurso, al kio donis grandan atenton kaj subtenon prof. Pan Chengdong, tiama direktoro de la universitato kaj kontribuinto al studo pri Goldbach-konjekto. Li atentigis, ke Esperanto, kiel internacia helpa lingvo kun forta vivipovo, ludos gravan rolon por akceli progreson de la homaro kaj disvolviĝon de sciencoj.

La E-kurso multe plaĉis al studentoj, ĉar ĝi pliriĉigis ilian vivon. La kursanoj ne nur diligente lernis kaj sin ekzercis en lernohoroj, sed ankaŭ aktive diskonigis kaj uzis Esperanton en libera tempo. Ili partoprenis ĉiun renkontiĝon kaj artan festivalon de la universitato, ludante en Esperanto. Ili ankaŭ disvastigis nian lingvon en montrofenestro per Esperantaj artikoloj, libroj, fotoj kaj memoraĵoj, por ke pli da instruistoj kaj studentoj konu Esperanton.

Per Esperanto niaj E-kursanoj ne nur kontaktiĝis kun alilandaj esperantistoj, akceptis alilandajn E-turistojn en Ĉinio, sed ankaŭ korespondis kun ili. Tio multe helpis al ili koni eksteran mondon. Samtempe, ili ankaŭ esperantumis kune kun aliaj ĉinaj esperantistoj. Post fondiĝo de la Shandong-a E-Asocio en 1986, plurfoje okazis en la universitato Esperantaj kunsidoj kaj simpozioj. Dank' al nia penado naskiĝis la gazeto "Verda Stelo en Taishan", en kiu legiĝas Esperantaj legaĵoj, raportoj pri E-movado kaj artikoloj pri E-lernado.

Dank' al subteno de la universitato, ekde 1990 la fremdlingva fakultato prenas Esperanton kiel la duan fremdan lingvon por siaj studentoj. La E-kurso



E-kursanoj kaj brita esperantistino (dekstre)

funkciis du horojn semajne kaj la studentoj akiris lernopojn, ekzamenite en semestrofinio. Diplomiĝinte el la universitato, niaj E-kursanoj entuziasme partoprenis E-aktivadojn en la loko, kie ili laboras, kaj promociiĝis sukcesinte en E-ekzameno.

Dum mia E-instruado mi aplikis Cseh-metodon kaj akiris ĝojigan efikon. La studentoj, kiuj ne anoncis sin por lernado en E-kurso pro iaj kaŭzoj, ofte vizitis nian kurson en libera tempo. Mia E-instruado estis atentata de s-ino Mila Horst-Kolinska de la Akademio de Esperanto. Ŝi multfoje skribis al mi kaj sendis al mi Esperantajn bildbendojn, librojn ktp. En 1994 mi invitite partoprenis la 79-an UK kaj la 28-an Konferencon de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

La E-instruado en Shandong-universitato daŭre funkcias. ■

*En 1968 la aŭtoro diplomiĝis el la franc-lingva fakultato de la Pekina Fremdlingva Instituto kaj en 1981 lernis Esperanton en la Unua E-kurso por Instruistoj de Ĉinaj Altlernejoj. Nun li laboras ankaŭ kiel vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario de la Shandong-a E-Asocio. Adr.: Okcidentlingva Fakultato de la Fremdlingva Instituto de Shandong-universitato CN-250100, Jinan, Ĉinio.

Du humuraĵoj



La aŭtoro

de RUBEN FELDMAN GONZALEZ (Usono)

La preĝo de patro Cushman

"Dio," diris patro Cushman, "mi venas al vi kiel mi faras ĉiutage, sed nun mi komencas pridubi vian ekziston"...

"Patro mia," daŭrigis patro Cushman per angora voĉo, "kial Becky Rutherford daŭre uzas minijupojn?"

"Dio, vi scias ke mi ĉiutage petegis al vi: Dio, diru al Becky ke ŝi ne uzu minijupojn."

"Eĉ pli, Dio mia, mi petegis de vi DEVIGE igi ŝin ne uzi minijupojn."

"Kial, Dio, ŝi devas montri siajn bone nutritajn, mielkolorajn gambojn, tiel fortikajn kaj firmuskolajn, senharajn, glatajn kaj brilantajn el ŝvito; en tia senhonta maniero?"

"Kial ŝi palpebrumas al mi, antaŭ ol mi komencas la dimanĉan predikon? Ĉu ŝi ne havas fianĉon? Ĉu ŝi?"

"Tamen, ĉu ŝi ne scias ke mi estas pastro kiu ĵuris porĉiaman seksabstinon, kaj ke tiu ĵuro pendas de mia kolo kvazaŭ dutuna kolĉeno?"

"Dio, patro mia... kiam mi deĵoras en la rito, kial ŝi montras al mi sian langon kun alloga, petola, bel-ega rideto?"

"Ĉu ŝi iel kredas ke mi estas farita el ŝtono?"

"Ĉu ŝi pensas ke mi estas kreita el plasto?"

"Kial dum la rito ŝi konstante rigardadas mian pantalonfendeton?"

"Dio, patro mia, ŝanĝu ŝin tute, male vi ne havos plu pastron en ĉi tiu herezema kaj blasfemema urbaĉo."

"Transformu ŝin, male mi devos foriri tre malproksimen."

"Ŝanĝu ŝin aŭ mi donos al ŝi francan kision."

La prelego de la historiisto

La prelego navigis tre bone ĝis kiam li komencis paroli pri "LA AĜO DE LA RACIO".

Li estis parolinta bone dum la unuaj dek minutoj de la prelego diskutinte la naskiĝon de la civilizacio

kaj la unuajn registritajn militojn en AKKAD kaj PERSIO 3 000 jarojn antaŭ KRISTO.

Li bonege kaj eksplicite priskribis la epokon de Aleksandro la Granda, liajn egajn kruelaĵojn kaj troajn ekscesojn, liajn avarecajn kaj sangosoifantajn generalojn, inkluzive la pereigajn kvereladojn inter ili mem.

La historiisto komencis heziti kiam li resumis la Romanan Imperion, la Romanan "PACON", kiu ankaŭ, kaj pli trafe, signifis "sklaveco".

Li pli flue eksplikis la unuajn jarojn de kristaneco, kiam la apostoloj fondis kelkajn socialismajn komunumojn bazitajn sur kunuzo de mono kaj varoj, la emfazado de kompatato, sobreco, aŭstero kaj la rekomendo ne havi infanojn en koruptita mondo, dum la unuaj cent jaroj post KRISTO.

Veraj kristanoj estis tuj poste mortigitaj, laŭ imperiestraj ordonoj el ROMO.

Poste la historiisto ruĝiĝis honteme kiam li diskutis la historion de la Papoj, la Inkvizicio, la Krucmilitoj kaj la Krucistoj, kiuj kreis dividiĝon ene de la kristana mondo, ankoraŭ facile videblaj.

La historiisto ekridetis parolinte pri la bonvolo de Francisko el Asiso, Lao Tse, BUDHO, Maister Eckart, Mohammed, Krishnamurti kaj aliaj amantoj de Bonfido.

Li ne ridetis kiam li parolis pri Giordano Bruno, Luther, Henry la 8-a de Anglio, Zwingli el Svislando, la Religia Reformado kaj pluaj dividoj kaj eĉ militoj inter kristanaj denominacioj.

Sed kiam li diris: "Nu, ni vidu la AĜON DE LA RACIO", li komencis ekridegi, ŝajne senkiale.

Li ridegis kaj ridegis proksimume 20 minutojn, ĝis unu el la ĉeestantaj studentoj telefonis por ambulanco.

Li neniam finis sian majstran prelegon.

Necesis tri tagoj por ke li konvinku la psikiatrojn ĉe la hospitalo ke li fartis bone, ke li devis iri hejmen, ke estis neniu kialo por ke li trapasu alian nokton enŝlosite en ĉambraĉo.

Li krome aldonis ke la "AĜO DE LA RACIO" ankoraŭ ne estis komencita.

Hundido kaj akvo

de LARISA KUZMENKO (Ruslando)

NI havas hundon Tomka. Pasintan someron ĝi estis ankoraŭ malgranda kun nigraj okuloj, longaj oreloj kaj mallonga vosto. Ni iris al la lago iufoje kun Tomka. Ni metis la hundidon en la sakon, por ke ĝi ne laciĝu.

Ĉe la lago ni longe ĵetis ŝtonetojn en akvon kaj konkuris — kiu ĵetos pli malproksimen.

La sako kun Tomka kuŝis sur la herbejo kaj jen ni vidis, kiel la hundido aperis el ĝi kaj ekvidis, kiel ŝtonetoj enakviĝas. Ĝi tuj kuris al la lago. Estis ridinde rigardi, kiel kuras Tomka sur la sablo kun kurbaj kaj mallertaj kruroj. Ĝi proksimiĝis al la akvo, enakvigis siajn piedojn, turnis sin flanken kaj rigardis al ni.

— Iru, Tomka, iru, ne timu, vi ne dronos, — ekkriis mia frato.

Tomka enakviĝis. Komence akvo kovris ĝian ventron, poste ĝian kolon kaj poste ĝi plene enprofundiĝis — nur la vosto kiel tubeto elstaris eksteren. Ĝi sin okupis pri io, sed subite elsaltis kaj komencis tusi, terni kaj snufi. Evidente ĝi volis spiri en akvo kaj akvo trafis ĝiajn nazon kaj

buŝon. Ne sukcesis Tomka preni ŝtoneton. Ni prenis pilkon kaj ĵetis ĝin en la lagon.

Tomka ŝatis ludi kun la pilko. La pilko brue falis sur la akvon, ektorniĝis kaj poste haltis.

Tomka ekvidis la ludilon, ne povis sin deteni kaj kuris al la lago. Ĝi kuris kaj jelpis pro ĝojo. Ĝi alproksimiĝis al la akvo.

Sed nun ĝi ne volis tuŝi akvon per la nazo. Ĝi iris, iris kaj subite eknaĝis. Ĝia kapo kun la nazo estis super la akvo. Ĝi naĝis al la pilko, kaptis ĝin firme per dentoj kaj naĝis reen al la bordo. Tiel ĝi lernis naĝon.

Ni prenis la pilkon, karesis la hundidon kaj diris:

— Vi brava, Tomka. ■



Pri “Ruĝdoma Songô”

Cao Xueqin, Ruĝdoma Songô, romano. Elĉinigiis Xie Yuming.

Eldonis Ĉina Esperanto-El-donejo 1995, unua el la tri volumoj, 582 p. ĉ. 23 eŭr.

Post legado de la unuaj 50 paĝoj mi ankoraŭ ne sciis ĉu mi finlegos ĉi tiun riveregan romanon. Ĝi ekiras malrapide, tu-setante, en nebulo de fumo, kvazaŭ raŭpa varotrajno. Malgraŭ evidenta helpo de la tradukinto, kiu esperantigas la plej oftajn proprajn nomojn, restas ankoraŭ pluraj dekduoj da propraj nomoj. Ĉinaj... evidente. Ankaŭ la stilo ĉinas. Fakte multe pli la stilo de la Prefaco fare de eminenta Zhou Ruchang, ol tiu de la teksto. Cetero mi ne ĉion komprenis. Eble vi pli saĝas:

“Kial oni donis la epiteton eks-terordinara aparte al tiu ĉi libro, se iu ajn romano, ekzemple *novel* en la angla lingvo, mem entenas kuriozecon kaj eksterordinarecon laŭ la koncepto pri la eŭropa literaturo kaj, se temas pri la grandeco, ĝi estas oftege uzata en la recenzo?”

Ĉu vi scias, ke la teatraĵoj de Ŝekspiro estas “operoj”? Bone, kial ne? Sed poste, en la teksto, kiam Jado, Jaspa, Ora kaj aliaj iras por spekti “operojn”, kion ili spektadas? Operon, dramon, opereton? Teatraĵon prozan, versan aŭ kantan? Kun aŭ sen muziko? Iom post iom la kunteksto forigas kelkajn hezitojn. Antaŭ la alveno al la 50a paĝo vi ekscios, ke ‘pornografia’ = priamora, ‘paŭperisma’ = malriĉega, ‘etikeco’ = respekto, ‘striis’ = krucas, ‘drinki’ = trinki alkoholaĵon, ‘ĉar-

latane’ = avare, ‘laika’ = nesperata, ‘plagi’ = minacegi, ‘fali en recidivon’ = ree malsaniĝi, ‘etika domo’ = bonmora domo, ‘debila’ = delikata, ‘sarkasme’ = moke. Poste foriĝos kelkaj dekoj da aliaj malpli gravaj semantikaj hezitoj. Sed, fakte, ĉio ĉi ne tro gravas, ĉar post la 50a paĝo, ĉu vi alki-timiĝis, ĉu vin kaptis la fluo de la romano, ĉu la tradukaĵo pliboniĝis, ĉiamaniere vi estas en unu 17-jarcenta virina kvartalo de ĉina aristokrata palaco, kaj nur tio, kion Cao Xueqin rakontas, vin interesos pli kaj pli forte.

Temas pri la priskribo de la ĉiutaga vivo de sentema adoleskanto, Jado, tutnome Jia Baoyu, filo de Jia Zheng, nepo de Jia Dai-shan, pranepo de Jia Yuan, duko de Rongguo. Jado, alterego de la aŭtoro, estas ege aliseksema, interesata kaj altirata de ĉio ina. Li observadas ĉiujn virinojn ĉirkaŭ si, samkiel siajn proprajn sentojn al ili. Por okcidenta leganto la priskribita rilataro inter gehomoj, sen okcidenta mitaro pri Amo, estas plena je surprizoj. Malfermiĝas ankaŭ la etoso de kunvivado inter edzinoj kaj kromedzinoj, ĉambristinoj kaj servistinoj, sen okcidentaj antaŭsupozoj moralaj. Tamen, ĉi tiu mikrokosmo estas pli ol bonmorega! Oni longe pridis-kutadas la kuntaŭgecon de koloroj inter diversaj vestaĵoj kaj mebloj, oni entombigas falintajn florpetalojn, oni citadas poetojn kaj filozofojn... kaj oni punadas unu la alian per kruele-gaj bastonadoj, kiujn la viktimo ĝentile dankadas, kiam li denove kapablas ekmoviĝi. Teksiĝas antaŭ la



menso de la leganto grandioza fresko de fajnega kultura vivo, kies ekvivalenton oni apenaŭ trovas en okcidento. Okazas suicidoj, mortoj, naskiĝoj, intrigoj kvazaŭ en TV-serialoj. Oni ekkonas religiojn, filozofiojn, politikajn doktrinojn kaj sekretajn moviĝojn de la ‘ĉina animo’. Kiam oni atingas la finon de la 40a ĉapitro, kaj de la unua volumo, t.e. la fino de la ĝisnuna esperantigo, oni mal-facile sin regas por ne tuj aĉeti la duan kaj trian volumojn en la franca, aŭ la angla, tiel forte oni emas daŭrigi la legadon. Ĉi tiu verko ja havas 120 ĉapitrojn en tri volumoj. Laŭ profesoro Zhou la lastajn 40 ĉapitrojn “alia homo aldone elpensis tiam, kiam jam multaj jaroj pasis post la morto de Cao Xueqin” kaj “intelekte kaj spirite regis granda distanco inter tiu aldoninto” kaj la aŭtoro. La supozita aldoninto ŝajne ne restis en la sana morala kaj politika perspektivo de la unuaj 80 ĉapitroj. Nu, tiaĵo ja eblas. Sed mi estus ege disrevigita, se tio fariĝus preteksto ne esperantigi la trian volumon de la verkego kaj mi estus devigita nutri min en la franca lingvo per la fiaj erotikaĵoj (eble eĉ pornografiaĵoj, mi plue havas esperon) de tiu ĉi lasta volumo.

ĈINIO

● La 1-an de marto, lernantoj de Xijiao- (Ŝjiĝjaŭ)-mezlernejo de Chongqing surstrate voĉlegis al urbanoj “Verda Manifesto” en Esperanto kaj la ĉina lingvo por partoprenigi ilin en la movado “Starigi novajn sociajn morojn”. Per tio ili diskonigis ne nur la manifeston, sed ankaŭ



Voĉlegado de “Verda manifesto” sur strato

Esperanton. Esperanta kurso funkcias de antaŭ unu jaro en la mezlernejo kaj la kursanoj intencas korespondi kun alilandaj e-istoj. (Nubo)

ARGENTINO

● La Barilochea Esperanto-Rondo (kadre de la UEA-kampanjo 2000) lanĉis per radio, revuo ktp. sloganojn por diskonigi Esperanton kaj ties aplikeblecon. Jam publikigitaj aŭ publikigotaj sloganoj tekstas: “ESPERANTO: la lingvo de la 21-a jarcento”; “ESPERANTO: monda sukceso. Partoprenu!”; kaj “ESPERANTO: vi havos amikojn en la tuta mondo.” La Barilochea E-Rondo proponas al esperantistoj de aliaj landoj uzi naci-lingve tiujn sloganojn por disvastigi intereson por nia lingvo. (Werner Schad)

GERMANIO

● Survoje estas teamo, kiu en si mem jam prezentas la interkulturecon el Oriento kaj Okcidento, niakaze germana. Survoje trejnas kompreniĝon kaj socialan kompetenton varie interrilati kun “fremdul(in)oj”. Ili peras scion ekzemple pri jenaj sferoj: evoluigo de konceptoj kaj programoj; grupa kaj projekta agado; kreo kaj vigligo de teamoj; konsilado pri interkulturaj temoj; vojoj al konflikto-prilaboro. Modernaj trafikiloj ebligas al ili labori en ĉiu ajn loko de la mondo. Bonvolu kontakti ilin por eltrovi kiel ili povus utili al vi kaj por konkretigi ilian ofertan laŭ viaj bezonoj. Skribu al: Sabine Trenner, Ebertystr. 46, D-10249 Berlin, Germanio. Tel: +49-(0)30-4268605. Retpoŝte: survoje@esperanto.de. (Survoje)

KUBO

● En la nuna jaro Radio Havano Kubo intencas digne celebri la 10-an jaron de la E-elsendoj en la radiostacio. Ili tre ŝatus kolekti diversajn intervjuojn kaj espereble fari tion en somero. Al amerika regiono ili elsendas en 25 m 11760 khz je 15:00 kaj poste je 23:30 utc samfrekvence. Al Eŭropo ili elsendas je 19:00 kaj je 22:00 utc ĉiam en 22 m 13715 khz. (Lourdes Lopez)

POLLANDO

● Silezia Esperanto-Asocio en Wroclaw, Sud-Orienta Pollando, invitas gesamideanojn kaj simpatiantojn de la internacia lingvo Esperanto al la 33-a Internacia Esperanto-Feriado. Ĝi okazos de la 10-a ĝis la 24-a de aŭgusto 1998 en Karpacz (Karpaĉ) en ĉarma ripozloko de la Sudety Montaro proksime al Ĉeĥio kaj Germanio. La provizora programo konsistas el: Esperanto-instruado; Konversacia rondo kun videofilmoj; Seminarioj dediĉitaj al elektitaj problemoj de konscia nutriĝado; Esperantaj seminarioj; Distra vesperoj kun ludoj, dancoj kaj kantoj; Per piedaj ekskursoj en la proksimaj kaj tre agrablaj ĉirkaŭaĵoj de Karpacz; Aŭtobusaj ekskursoj al vidindaj lokoj. Kontakta adreso: Silezia Esperanto-Asocio, 50-208 Wroclaw, str. Dubois 3/1, Pko BP IV O/Wroclaw, Pollando. (Silezia Esperanto-Asocio)

FRANCIO

● Okaze de la 90-jara ekzisto de UEA (1908-1998), interkonsente kun la ĝenerala direktoro, Reinhard Haupenthal kompilas bibliografion de ĉiuj verkoj eldonitaj de UEA. Ĉi bibliografio, krom la monografia literaturo, entenos ankaŭ la revuojn de UEA, IEL kaj TEJO, kaj aliajn periodaĵojn (jar-libroj kaj kongresaj libroj). Bibliografiajn atengitojn kaj ofertojn de malnovaj materialoj por aĉeto volonte akceptas la kompilanto. Lia adreso: Reinhard Haupenthal, B.P. 30, F-57520 Grosblierderstroff, Francio. (Reinhard Haupenthal)

● Okaze de la 75-a datreveno de la naskiĝo de d-ro Andre Albault, long-jara prezidanto de la Akademio de Esperanto, aperos ampleksa festlibro sub la titolo “De A al B”. La kontribuoj, kiujn redaktas 19 personoj, ampleksas vastan tem-paletron el la kampoj esperantologio, interlingvistiko kaj literatur-scienco. Kiu deziras enskribiĝi en la liston de la gratulantoj (Tabula Gratulatoria) aŭ/kaj ricevi pliajn detalojn (inkluzive de antaŭmendo) bv. kontakti la eldonejon: Edition Iltis, S-ino Irmī Haupenthal, B.P. 30, F-57520

Grosblierderstroff, Francio. (Irmī Haupenthal)

Deziro de edzino (Novelo)

EN la pasinta vintro, post tri-semajna kuraco do en hospitalo, mia edzino Aizhen mortis de leŭkemio.

Dum la kuracado mi akompanis ŝin hejmen por pasigi la Novjaran Tagon, kio estis la lasta fojo en ŝia vivo. Ŝi ordigis la ĉambron, kolektis ĉiujn siajn fotojn por ilin forpreni. Venis la tempo adiaŭi la pli-ol-unu-jaran filinon Wenwen, kiu surprizite levis la kapon:

“Panjo, kien vi iros?”

“Mia kara! Mia kara!” kaŭriĝinte, Aizhen diris al la filino. “Kisu min ankoraŭfoje. Panjo vizitos alian landon.”

La edzino brakumis la filinon vango ĉe vango. Larmoj ekfluis el ŝiaj okuloj.

Apenaŭ ŝi sidiĝis en taksion, ŝi ekploreĝis. Mi firme brakumis ŝin, por ke ŝi kvietiĝu. Kiel edzo mi konis ŝian firmecon, kian malmultaj virinoj havas.

20 tagojn post ŝia morto, mi ricevis paketon kun 17 leteroj envolvitaj en parfumitan mantukon. Sur ĉiu koverto estis gluita poŝtmarko sen stampo sur la fronta flanko kaj dato notita de ŝi sur la dorsa flanko. Laŭ la dato mi malfermis la unuan leteron kaj voĉlegis ĝin al la filino:

Kara mia Wenwen,

Ĉu vi sopiras panjon?

Mi sopiras vin en ĉiu tago. Nun mi skribas al vi tiun ĉi leteron en alia lando, kaj post longa tempo mi povos hejmenreveni. Ĉu vi obeas paĉjon kaj la vartistinon, kiam mi ne estas ĉe vi?

La lasta frazo estas: “Mi brakumas Wenwen.”

Tiamaniere post ĉiu dua aŭ tria semajno ni ricevis unu leteron “senditan el eksterlando”. En la leteroj ŝi atentigis nin pri vestado laŭ la sezonalterno, pri aĉeto de greno kaj pri nutrado de la filino. Ĉiufoje, kiam mi legis ilin, larmoj malsekigis miajn okulojn; kiam Wenwen ĉagreniĝis pro sopiro al la patrino, mildaj vortoj en la leteroj ĉiam trankviligis ŝin. Iom post iom ŝajnis al ni, ke ŝi estas en Japanio. Mi jam kutimis atendi ŝian leteron.

En sia 9-a letero la edzino konsilis al mi havigi novan patrinon al Wenwen. “Eĉ se vi reedziĝos, mi ankoraŭ estos via edzino,” tiel ŝi skribis.

Post unu jaro mi konatiĝis kun Yali, mia nuna edzino, kiu terure similas al Aizhen je aspekto kaj karaktero. Kvankam ŝi spertis eksedziniĝon, tamen

ŝi, neniam naskinta, ne havis sperton flegi infanon. Ŝia naiveco kaj gajeco plaĉis al mi kaj mildigis mian malgajecon. Mi rakontis al ŝi pri Wenwen kaj la deziro de la edzino.

“Mi volas provi,” Yali respondis. “Lasu min viziti ŝin kaj ni rigardu, ĉu ŝi ŝatos min.”

Fine de aprilo, t.e. ses monatojn post ricevo de la 16-a letero, mi voĉlegis al Wenwen la lastan leteron de ŝia patrino. Anstataŭ sin ĵeti al mi por kapti la leteron, aŭ porti benketon por sidi antaŭ mi, Wenwen nur donis indiferentan rigardon al mi kaj amuziĝis denove per sia urso-ludilo.

Kara mia etulo:

Jen ĝojiga novaĵo: Finiĝis mia lernado, baldaŭ mi revenos! Mi revidos vian paĉjon kaj mian karan, ĉu vi ĝojas? Post longa tempo eble mi ne povas rekoni vin. Ĉu vi povas rekoni min?

Mi observis la mienon de Wenwen. Kun maltrankvilo mi rimarkis, ke ŝi tutanime banis la urso-ludilon, kvazaŭ nenion aŭdinte.

Kion mi diru al ŝi? Mi ekkonsciis, ke ŝi baldaŭ 3-jariĝos.

Iun serenon dimanĉon, akompanate de mi, Yali eniris en nian domon, ĵus kiam la vartistino finkombis al Wenwen la harojn. Kun nudaj piedoj la etulino, sidante en lito, foliumis koloran bildgazeton.

“Wenwen,” mi sentis mian voĉon tremanta. “Rigardu! Ĉu venas panjo?”

Kun hezito Wenwen fiksis rigardon sur Yali, kiu surplankigis la ledan kofron, rapidis al la lito kaj brakumis Wenwen:

“Mia kara, ĉu vi ne rekonas min?”

La mieno de Wenwen estis kompleksa: konsterniĝo, timo... Streĉiĝanta, mi rigardis tion. Dank’ al Dio! Ŝi demetis la bildgazeton, ekploreĝis ĝis la vizaĝo ruĝiĝis, poste ŝi frapis Yali per siaj pugnetoj:

“Panjo, pro kio vi revenis tiel malfrue?”

Yali brakumis la etulinon, kaj la lasta tremante ĉirkaŭprenis ŝian kolon. Yali rigardis min, kaj larmoj plenigis ŝiajn okulojn.

“Mia kara,” ŝi kisis la vangojn de la etulino, “panjo neniam foriros.”

Ĉion ĉi tion la patrino de la etulino aranĝis por ni antaŭ unu kaj duona jaroj, kiam ŝi kuŝis en la hospitalo. ■

Elĉinigis **Xiang Hong**

La oka konkurso de EPĈ-legado finita

Post aperigo de la demando por la oka konkurso de EPĈ-legado en la novembro numero de 1997, ni ricevis 51 respondojn el 20 landoj.

El la respondoj ni trovis, ke la procento de la ĝustaj respondoj estas pli alta ol tiuj en la pasintaj jaroj. La konkurso plejparte estas niaj malnovaj legantoj, kaj iuj el ili fariĝis granda konanto pri Ĉinio. Tomislav Mitroviĉ el Jugoslavio ne nur respondis "1997 estas Jaro de Bovo", sed ankaŭ skribis apude la ĉinan ideogramon en signifo de bovo. N. Konchenko kaj Bajkov Miĥail el Rusio bone konas la bestan kronologian sistemon de Ĉinio. Bajkov Miĥail, Clary Françoise el Francio, Szentgyorgyi Zoltan el Hungario kaj aliaj skribis ankaŭ la nomojn de malnovaj filmoj kaj filmsteloj de Ĉinio.

Post lotado ni anoncas, ke la unuagradan premion gajnis Vladimir Ĥodin el Rusio, Erkki kaj Aira Rontynen el Finnlando. Ili ricevis po unu klozorean florvazon. La duagradan premion gajnis Lenĉe Efremova, Francisco Jurandir de Melo, Rudi Izlakar, Magdolna Rovid, Clary Françoise, Hans Burkhard Dietterle, Kiss Ilona, Biam Raviolo, Shen Guangmeng, Tomislav Mitroviĉ, Gurĉinovska Emiliĵa, Snezana Jovanovska, N.

Konchenko, Jazeps Slars, Elizabeta Kermeci, Nguyen Van Dien, Eryebet Todorov, Oleg Vasiljev, Bajkov Miĥail, Liliĵa Pavlova Koleva, Viktoria Mihok-Geczi, S.V. Konjasova, Siniĵa Veliĉkoviĉ, Vaske G. Otto, Szentgyorgyi Zoltan, Ivica Scepanovic Truto, Juhasz Viola kaj Halina Jur-Berezowska. Ili ricevis po unu esperantigitan libron "Fulmotondro" aŭ "Sunleviĝo".

La konkurso estas iomete malsama ol la antaŭaj, t.e., la konkursantoj respondu per siaj propraj vortoj. Suzanna Barabas el Rumanio opiniis, ke tio estas krea laboro, kvankam pli malfacila, tamen pli interesa. Precipe la lastaj tri demandoj estis pensigaj por niaj legantoj antaŭ ol respondi, dum ni akiris el la respondoj multajn utilajn informojn, kio helpas al plibonigo de nia laboro. Preskaŭ ĉiuj partoprenantoj diris, ke la artikoloj en la rubriko "Laŭ la Silka Vojo" estas tre interesaj. Multaj el ili diris, ke estas tre malfacile por ili elekti nur unu. Preskaŭ duono de la partoprenantoj elektis Dunhuang, la aliaj — la Grandan Muron de Jiayuguan, Sayram-lagon, Qilian-montaron, Hejmlokon de Ĉielaj Ĉevaloj, Venton de Dabancheng kaj la antikvan urbon Juyan. Ankaŭ

la tri novaj rubrikoj plaĉas al niaj legantoj. Pri Hongkong, plejparto de la partoprenantoj opinias, ke la estonteco de Hongkong estos bela, se oni praktikas la politikon "Unu lando, du sistemoj". Ĉirkaŭ duono de la legantoj diris, ke ili akiris la informon de nia revuo, aŭ kvankam de lokaj komunikiloj, tamen ili akiris detalajn informojn de nia revuo.

luj ĝustaj solvoj estas jene (ciferoj en parentezo markas numeron kaj paĝon, en kiuj troveblas la ĝusta solvo): 1. Jaro de Bovo (1-46); 2. Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio (6-4); 3. la 4-a de majo. Ĝi devenas de la studenta movado, kiu okazis en Pekino, la 4-an de majo 1919. (5-16); 4. umefloro, pino kaj bambuo (8-16); 5. "Aŭtobiografio de Reĝo Gesar" de la tibeta nacio, "Ĝanger" de la mongola nacio kaj "Manas" de la kirgiza nacio. (9-41); 6. (5-38); 7. Chongqing (7-42). Iuj konkursantoj eraris ĉefe en la kvina.

La demandaron de la naŭa konkurso ni aperigos en la novembro numero de 1998. Ni esperas, ke pli da legantoj partoprenos la konkurson kaj donos al ni konsilojn kaj proponojn. **La Red.**

Originalaj kontribuajtoj petataj

Karaj legantoj,

En 1995 ni malfermis la rubrikon "Originalaj Verkitaj". Multaj legantoj sendis al ni kontribuajtojn, precipe poemojn. Koran dankon! Por la plua prosperiĝo de tiu ĉi literatura ĝardeno ni esperas, ke vi daŭre sendos al ni viajn kontribuajtojn originalajn (netradukitajn), preferinde novelojn, prozaĵojn, eseojn kaj aliajn literaturajtojn. Bon-

venaj estas foto de aŭtoro kaj ties mallonga aŭtobiografio. Ni sendos E-librojn al la kontribuajtoj, kies verkaĵoj estos aperigitaj.

Kontribuajtojn bonvolu sendi al s-ino Xiang Hong, El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio.

Anticipan dankon pro via kunlaboro!

La Red.



Budhismo en Tibeto

Teksto de JIANG SHANGLI
Fotoj de DU ZEQUAN

PRESKAŬ ĉiuj tibetanoj kredas je budhismo. En Tibeto estas 1 787 temploj kun 46 380 lamaoj. En la temploj oni faras sutro-recitadon kaj aliajn religiajn aktivadojn.

Budhismo, kristanismo kaj islamismo estas ĉefaj religioj de la mondo. Budhismo, fondita de Ŝakjamunio en la antikva Hindio, naskiĝis pli frue ol kristanismo kaj islamismo. Ĝenerale, ĝi celas transcendan staton de perfekta sereneco, atingebla per kompleta neniigo de ĉia deziro kaj sufero en la vivo, t.e. staton de nirvano. Por atingi la celon necesas memkulturo pri bonfaremo, absorbiteco kaj prudento. Pli ol cent jarojn post la forpaso de Ŝakjamunio, budhismo disvastiĝis en la tuta Hindio kaj aliaj regionoj de la mondo kaj formiĝis pli ol 20 sektoj. Ĝi pli-malpli influis la kulturon, politikon kaj folkloron de la regionoj, kie ĝi populariĝis, kaj asimilis sukcon el ili por sin disvolvi. La tibeta budhismo, spicita per tibeta kulturo, havas apartajn ecojn.

Budhismo venis en Ĉinion en la 1-a jc kaj en Tibeton en la 7-a jc. Ĝi havas du etapojn de disvolviĝo en Tibeto. La unua etapo daŭris de la 7-a jc ĝis 838 kaj la dua komenciĝis en 978. Meze de la 7-a jc la tibeta reganto Sunzamkampo edziĝis al princino Wencheng de Tang-dinastio (618-907) kaj nepala princino Chizun, kiuj kunportis budhostatuojn al Lhasa, ĉefurbo de Tibeto. Por tiuj budhostatuoj Sunzamkampo konstruigis la templojn Jokhang kaj Ramoche. Post tio en Tibeto konstru-

iĝis aliaj temploj, fondiĝis organizo de bonzoj (ĉi tiuj estas nomataj lamaoj ekde la posta periodo de la 10-a jc.) kaj tradukiĝis budhismaj sutroj. Tiutempe, laŭ leĝo, sep familioj vivtenis unu bonzon; bonzoj partoprenis en ŝtataj aferoj; kaj estis severe punitaj tiuj, kiuj malrespektis la Budhon, doktrinion kaj bonzon.

La tibeta budhismo disvolviĝis en batalo kontraŭ la loka primitiva Ben-religio. Kiam Langdharma regis Tibeton, tiuj aristokratoj, kiuj kredis je Ben-religio, estis en potenco, kaj la tibeta budhismo estis malpermesita, temploj fermitaj kaj bonzoj devigitaj ĉesigi religiajn aktivadojn. Ĉ. cent jarojn post tio, silentis la tibeta budhismo.

En la 10-a jc denove vigliĝis la tibeta budhismo, kaj komenciĝis ĝia dua etapo. Hindaj majstroj estis invititaj al Tibeto por prediki la doktrinion kaj nemalmultaj tibetanoj studis en Hindio kaj Nepalo por prediki la doktrinion kaj starigi religiajn sektojn en Tibeto. Tiutempe influhavaj estis la sektoj Ninma, Gedang, Sa'gya, Geju kaj Gelug.

En la 11-12-a jc tibeta majstro fondis Ninma-sekton, kiu sekvis la malnovan doktrinion. Malsamaj sektoj de la tibeta budhismo havas malsamajn manierojn de instruado. Ekz., la sektoj Ninma kaj Geju praktikas esoterismon.

La esoterismo de la tibeta budhismo instruas ĉefe la doktrinion de la hinda budhismo en malfrua periodo. Tamen tio ne signifas, ke la tibeta budhismo estas esoterismo, ĉar la sektoj Gedang kaj Gelug

tre atentas ankaŭ ekzoterismon, precipe instruadon de spertaj majstroj. Komence de la dua etapo tiuj, kiuj pledis por esoterismo, subtaksis ekzoterismon; tiuj, kiuj alte taksis majstran instruadon, malestimis doktrinion; kaj tiuj, kiuj severe observis tabuojn, oponis kontraŭ esoterismo. Sub tiu cirkonstancaro hinda majstro Atiŝa estis invitita en Tibeton por ekspliki la ideon pri akordiĝo de esoterismo kaj ekzoterismo kaj principon sekvendan por memkulturado. En 1056 lia disĉiplo Brom-ston konstruigis la templon Rva-sgreng por prediki la doktrinion de sia majstro. Surbaze de tio formiĝis la sekto Gedang (la vorto Gedang signifas tibetlingve, ke Tripitako estas gvidilo por bonzoj dum ilia tuta praktikado). La doktrino de la sekto havis grandan influon sur aliajn sektojn.

En 1073 majstro Gongque Jiebo konstruigis la templon Sa'gya kaj fondis la sekton Sa'gya (la vorto Sa'gya signifas tibetlingve blankan teron). La templo ricevis la nomon ĝuste pro sia lokiĝo sur blanka tero. La sektestreco estas heredita de la familio de la majstro generacio post generacio. La sekto pledis por ekzoterismo kaj esoterismo pri bonfaro kaj atingis la kulminon de sia disvolviĝo en Yuan-dinastio (1206-1368). En 1270 Kublajo, imperiestro de Yuan-dinastio, nomumis Basiba, la 5a-generacian estron de la sekto, sia instruisto kaj rajtigis lin mastri 130 mil familiojn en Tibeto kaj ĉiujn ĝiajn politikajn kaj religiajn aferojn.

Komence de la 15-a jc ĉiuj sektoj de la tibeta budhismo abolis siajn tabuojn kaj lamaoj ĉasis potencon kaj riĉaĵon. Pro tio Congkapa, fondinto de la sekto Gelug (signifanta "bonfaro"), iniciatis reformadon de la religio. Laŭ la doktrino de Gedang-sekto li opiniis, ke ĉiuj lamaoj devas strikte observi la tabuojn, resti ĉiam en fraŭleco kaj apartiĝi de kamplaboroj. Laŭ li, la administrado de templo devas esti severa, la esoterismo kaj ekzoterismo estas egale gravaj kaj praktikendaj kaj antaŭ ĉio necesas praktiki ekzoterismon. Ganden, Drepung kaj Sera estas ĉefaj temploj de Glug-sekto kaj ankaŭ bazo de ĝia disvolviĝo. Post la forpaso de Congkapa la sekto pli kaj pli fortiĝis. En 1447 lia disĉiplo Gendun Drupa konstruigis la templon Zhaxilunbu en Xigaze, rezidejo de Banĉen-lamao. En 1542 la sekto invitis Sonam Gyatso kiel abaton de la templo Drepung. Li estis rigardata kiel reenkarniĝinto de Gendu Gyatso, Dalai-lamao la Dua. En 1578 Anda-hano, tribestro de Tumd de

Mongolio, titolis Sonam Gyatso kiel Dalai-lamaon la Trian (la titoloj de Dalai-lamaoj la Unua kaj Dua estis donitaj de posteuloj), kaj tiam komenciĝis la titolo Dalai kaj la metempsikoza sistemo de viva budho de la sekto. "Dalai" signifas "maro" mongollingve kaj "Dailai-lamao" — "majstro kun virto kaj saĝo grandaj kiel maro". En 1653 imperiestro Shizu de Qing-dinastio titolis Ngawang Losang Gyatso kiel Dalai-lamaon la Kvinan. Ekde tiam estas praktikata la metempsikoza sistemo de Dalai-lamao, kies reenkarniĝinto nepre devas esti sankciita de la centra registaro de Ĉinio. En 1645 Guŝi-hano, tribestro de Hoxud de Mongolio, titolis Losang Chosgyl Gyantsen, disĉiplon de Congkapa, kiel Banĉen Pokedor, nome Banĉen la Kvaran (la titoloj de Banĉen-lamaoj la Unua, Dua kaj Tria estis donitaj de posteuloj), abaton de la templo Zhaxilunbu kaj reganton de la malantaŭa Tibeto. "Banĉen" signifas "granda erudiciulo" sanskrite. En 1713 imperiestro Kangxi de Qing-dinastio titolis Banĉen la Kvinan (Losang Yigshe) kiel Banĉen Erdeni ("Erdeni" signifas "trezoro" manĉurlingve) kaj konfirmis la pozicion de Banĉen en la sekto.




Antaŭ Jokhang-templo

Ekde tiam estas praktikata ankaŭ la metempsikoza sistemo de Banĉen-lamao, kies reenkarniĝinto nepre devas esti sankciita de la centra registaro de Ĉinio. Tiamaniere formiĝis la metempsikozaj sistemoj de Dalai- kaj Banĉen-lamaoj en la sekto Gelug. Subtenate de la Qing-dinastia kortego, la sekto fariĝis reganto de Tibeto.

La tibeta budhismo distingiĝas per sia aparta koloro. Post la forpaso de viva budho oni povas serĉi lian reenkarniĝinton por transpreni lian tronon, kio mankas en aliaj lokoj de Ĉinio. La disvastiĝo de la tibeta budhismo kaj ĝiaj originala memkulturado kaj instruado ebligis bone konservi multajn budhismajn sutrojn en la Tibeta Sankta Libro. La tibeta budhismo enkondukiĝis en aliajn ĉinajn regionojn, kiel tiuj de hanoj, mongoloj kaj manĉuroj, kaj en Mongolion, Rusion, Sikimon, Bhutanon, Nepalon, eŭropajn kaj amerikajn landojn.

Budhismo havas influon sur politikon, ekonomion, kulturon kaj aliajn kampojn de Tibeto. Origine Potala-palaco estis palaco de reĝoj, sed poste pro populariĝo de budhismo ĝi fariĝis politika kaj religia centro de Tibeto. Ĝi estas sanktejo en la okuloj de la tibetanoj. ■



1. Potala-palaco
2. Statuo de Congkapa
3. La relikvo-stupao de Banĉen Erdini la Deko
4. Konservejo de budhismaj sutroj
5. Fresko en Potala-palaco



Dramo en Ĉinio

EN Ĉinio estas pli ol cent specoj de tradiciaj teatroj, kiujn oni prezentas kantante, dum dramo originis el alia lando. Antaŭ 90 jaroj ĝi venis en Ĉinion kaj kunfandiĝis kun la ĉina kulturo. Jam de la komenco ĝi havas multnombrajn spektantojn.

DEBUTO EN ĈINIO

Influate de la japana novskola teatro, en 1907 ĉinaj studentoj en Japanio starigis la draman trupon Printempa Saliko. En Tokio ili prezentis "La Damo de Kamelioj" de la franca dramisto Dumas Alexandre (1824-1895) kaj "Kabano de Onklo Tom" (alinome "Vivo inter la Malsuperaj Socianoj") de usona dramisto Stowe Harriet E. Beecher (1811-1896). Poste ili prezentis la dramojn en Ĉinio. Diferencaj de malnovstilaj ĉinaj teatroj, dramoj estas prezentataj dialoge kaj sen akompano de muziko, do oni nomas ilin teatro novskola aŭ civilizita.

Ĉina dramisto Hong Shen lernis dramaturgion en Harvard-universitato. En 1922 li revenis Ĉinion kaj enkondukis en ĝin la prezentan kaj reĝisoran sistemojn de la Okcidento. Tiam furoris la moro en civilizita teatro, ke aktoro ludis rolon de virino, ĉar laŭ ĉinoj, virinoj ne devis sin montri antaŭ publiko, por ne paroli pri teatro-prezentado. Sed iuj aktoroj ludis virinan rolon afekte, kio vekis ridegon ĉe la spektantoj. Por normaligi la dis-

volviĝon de la dramo en la tiam Ĉinio nepris rompi la rutinon.

Hong Shen kuraĝigis aktorojn al dramludo kaj la lastaj bone ludis la rolon, dank' al tio la spektantoj ĝuis agrablan prezentadon kaj finiĝis la epoko, en kiu viroj aktoris kiel rolulinoj. Poste li surscenigis uzaĵon por ĉiutaga vivo kiel rekviziton, specialigis dekoracion kaj aranĝis scenejajn lumojn laŭ la intrigo. La aktoroj portis vestojn konforme al la reala vivo. Dank' al tio la spektantoj bone konis la dramon.

FAMAJ ĈINAJ DRAMOJ

La Popola Arta Teatro de Pekino tre famas en Ĉinio. Kun elstaraj dramistoj, reĝisoroj kaj aktoroj, ĝi distingiĝas per sia propra prezentstilo. Menciindas ĝia unua direktoro Cao Yu, majstro de la ĉina dramaturgio. En 1933 li, 23-jara, finis sian unuan dramon "Fulmotondro", kiu temas pri tragedio de du generacioj: juna kaj bela servistino kaj la filo, bastardo de s-ro Zhou kaj ŝia patrino, servistino de la familio, enamiĝis unu al la alia kaj la belulino gravediĝis. Sed ne atendite, ili estis gefratoj de la sama patrino kaj malsamaj patroj. Klariĝis la vero kaj la gejunuloj sin mortigis pro la incesto... La intrigo de la dramo estas komplika kaj animskua. Per intensa konflikto la aŭtoro malkovris la internan suferon kaj tragikan sorton de la personoj

en la dramo, kondamnis la tiaman malluman socion kaj esprimis sian deziron pri la perfekta vivo. La dramo "Fulmotondro", kiu havis premieron en 1954, estas rigardata kiel repertuara peco de la Popola Arta Teatro de Pekino.

Laŭdindas prezentado de dramoj en pura pekina dialekto. Ties reprezentanto estas la dramo "Tetrikejo" de majstro Lao She (1899-1967). La dramo prezentas la 50-jaran prosperon kaj malprosperon en la malnova Ĉinio kaj la animstaton de diversaj socianoj, prenante tetrikejon en la malnova Pekino kiel sian fonon. Fama aktoro Yu Shizhi bone ludis la rolon de mastro de tetrikejo, kiu penis ĉiamaniere por bono de divers-okupaj personoj, sed ne sukcesis sin liberigi de la tragedia sorto. La dramo estis prezentata en Germanio, Francio, Svisio kaj aliaj landoj. Fama brita reĝisoro opiniis, ke ĝi estas elstara pro sia nacia stilo.

En la lastaj jaroj la teatro prezentis ankaŭ la dramojn pri la reala vivo, ekz., "La Strateto Xiaojing" kaj "Loĝantara Komitato de Toutiao"

KUNE PROSPERU "CENT FLOROJ"

Nun en Ĉinio estas pli ol 200 profesiaj dramaj trupoj. Samkiel la Popola Arta Teatro de Pekino, ankaŭ multaj el ili havas siajn proprajn naciajn stilojn kaj lokajn kolorojn. La Tibeta Drama

Trupo estas unu el ili. En ĝi laboras tibetaj dramistoj, reĝisoroj kaj aktoroj. Ĝis nun ili verkis kaj prezentis 150 dramojn grandajn kaj malgrandajn. Post lernado en teatra instituto la tibetaj artistoj ne nur levis sian artan nivelon, sed ankaŭ pli profunde kaj pli komplete konis sian propran nacion. Dank' al tio, ili plene diskonigis per prezentado la afablecon, bonkorecon kaj firmecon de la nacio vivanta sur la neĝkovrita altebenaĵo. La historiaj dramoj, kreitaj de ili, kun grandioza sceno kaj prezentataj en la lingvoj tibeta kaj han-a, ekzakte manifestas la historion de la tibeta nacio kaj prikantas la amikecon inter la tibetanoj kaj han-oj. En Ĉinio estas la Infana Arta Teatro. En la 50-60-aj jaroj la teatro prezentis la dramon "Iridfloro", kiu faris sensacion en la socio. De la dramo la infanoj komprenis afablecon kaj diligentecon. Por ke la kamparaj infanoj povu spekti dramojn, la aktoroj de la teatro prezentis en kamparo pli ol 100 fojojn ĉiujare. Krome, la ĉina registaro investis por konstrui alian infanan teatron kun haloj grandaj kaj malgrandaj por prezentado. La teatro planas starigi artan lernejon por infanoj kun la celo akceli la disvolviĝon de infanaj dramoj.

La Ĉina Junulara Arta Teatro kaj la Centra Eksperimenta Dram-trupo de Ĉinio havas komunan konon: La nova naskiĝas el senĉesa koliziado de la malsamaj stiloj. Por tio ili ne nur kunlaboras en prezentado, sed ankaŭ sin riĉigas pere de okcidentaj dramoj. Ekde la fino de 1997 en Ĉinio sursceniĝis famaj dramoj de aliaj landoj, kia "Domo de Pupoj" de Ipsen Bodil (1889-1964). Memore al la 100-jariĝo de fama germana dramisto Brecht Bertolt (1898-1956), la Ĉina Junulara Arta Teatro



Sceno el la dramo "Tetrinkejo"

prezentis ĉi-jare lian dramon "La Tripenca Opero", kiu temas pri la vivo de la malsupra socio de Germanio en la pasinteco. Per tio ĉinaj artistoj esperas konigi la dramaturgion de Brecht Bertolt al la ĉinaj spektantoj kaj heredi de li la tradicion neniam apartigi sin disde la reala vivo.

ANTAŬ DEFIO

Sekve de popularigo de televido kaj rapidigo de la ritmo de la vivo, dramo estas malvarme traktata kaj multaj aktoroj preferas roli en filmo kaj televido, ĉar per tio ili multe gajnas kaj rapide famiĝas. Krome, la afero de la dramo suferas ankaŭ de manko de mono. Antaŭe la ĉinaj artaj trupoj vivis de subvencio donita de la ŝtato, sed 90 jarojn post kiam dramo venis en Ĉinion, oni ne povis ne alpreni ankaŭ ĝian administran rimedon kaj provis diversajn investajn manierojn, ekz., investado de kultura kompanio, de teatro kaj kultura kompanio aŭ dramverkado de kultura kompanio. Ĉe la fino de 1997 estis prezentata en Pekino fama franca dramo, investita de kultura kompanio. La prezentado estis re-

kompencita per granda sukceso arta kaj financa. Laŭdire, antaŭe neniu dramo ĝuis tiel grandan investon, havis tiom da aktoroj kaj tiom altnivelan dekoracion, kia ĝi.

La vodevilo pri kampara vivo "Knabinoj en Sia Plej Bela Aĝo" estis verkita de drama trupo de nordorienta Ĉinio. Ĝi estas disvastigata de diverslokaj kulturaj kompanioj. Ĝis nun la trupo turneis pli ol 20 mil kilometrojn por prezenti ĝin kaj enspezis 400 mil juanojn. Lastatempe la trupo kontraktis kun Shandong-provinco pri 100-foja prezentado de la vodevilo. ■

KOREKTO

Legu unuopa muzikisto. Tiel sinjoro Nanguo ne plu povis miksiĝi en la ensemblo kaj forkuris. post sed de p. 11, dekstra kolumno, 12-a linio de malsupre, 5-a numero, 1998.

La Red.

lam dezerta monto verdigita



Teksto kaj fotoj de ZHANG XI


Tio estas ordinara montvilaĝo en norda Ĉinio. Sur monto malantaŭ la vilaĝo kreskas fruktarboj kaj aliaj plantoj: sur la suda deklivo prosperas pomarboj, prunarboj, pirarboj kaj persikarboj, kaj sur la norda — pinoj kaj cipresoj. En la kvar sezonoj la monto kun verdaj arboj, kantantaj birdoj kaj frustrantaj riveretoj estas plezuriga.

La menciita loko, nomata Zhuanshanling, antaŭe estis dezerta. Dek jarojn antaŭe, gvidate de la vilaĝestro, la vilaĝanoj res-


pondis la alvokon de la ŝtato rapidigi utiligon de dezertaj montoj kaj akceli la disvolviĝon de la kamparo. Ili suriris sur la monton por forigi ŝtonojn kaj herbaĉojn kaj plantis arbojn. De la monttalo ĝis la montpinto, ili fosis cisternojn rondajn kaj kvadratajn kun profundo de du metroj, el kiuj la plej granda povas rezervi 200 kubmetrojn da akvo. Samtempe ili konstruis digojn ĉe riveroj por konservi akvon. Dank' al ilia laboro, la dezerta monto pleniĝis de florplantoj kaj fruktarboj.



Ambaŭflanke de rivereto



Konstruado de digo



Zhuanshanling antaŭ dek jaroj
Foto de QI ZONGDI



Esplorado por plua verdigo

Familio de bronzaĵ-riparistoj

TIU familio estas ordinara kaj neordinara. Same kiel aliaj familioj ĝi vivas kvietan vivon. Ĝi okupiĝas pri riparado de difektitaj bronzaĵoj.

La 76-jara patro nomiĝas Jia Yubo (Ĝja Jubo). Li estas eminenta riparisto de antikvaĵoj en Ĉinio. Ripari antikvaĵojn kiel sendependa profesio aperis en Ĉinio post la jaro 1840. En Pekino en la kortego de Qing-dinastio eŭnuko Yu estis kreinto de tiu profesio. Lia moknomo estis Oblikvbuŝa Yu. Li respondecis pri riparo de bronzaĵoj de la kortego. Poste li forlasis la kortegon, laboris kiel riparisto kaj akceptis disĉiplojn. La instruisto de Jia Yubo estas lernanto de disĉiplo de Oblikvbuŝa Yu. Jia Yubo eklernis la arton, kiam li estis 13-jara. Post 10 jaroj li finis la lernadon kaj komencis ripari bronzaĵojn kaj ankaŭ oraĵojn, arĝentaĵojn,

Jia Wenzhong en riparado de elterigita bronzaĵo



ceramikaĵojn kc. Li majstris diversajn riparajn teknikojn. En la 30-aj kaj 40-aj jaroj li riparis pli ol mil bronzaĵojn, sed plejparto de ili estis forportita en aliajn landojn. Iuj estas konservataj de famaj muzeoj de tiuj landoj. De la 50-aj jaroj Jia Yubo riparis multajn ŝtatprotektatajn antikvaĵojn. Samtempe li disĉipligis pli ol 20 homojn, kiuj jam fariĝis ĉefaj riparistoj. Ankaŭ liaj 5 filoj fariĝis specialistoj tiuflankaj.

Lia plej aĝa filo estas preskaŭ 50-jara kaj la plej juna — pli-ol-30-jara. Ĉiuj havas eminentajn teknikojn. Ili jam riparis kelkmil ŝtatajn unuaklasajn antikvaĵojn. En la knabeco iliaj ludiloj estis bronzaĵ ĉevaletoj, tintiloj kaj seruroj, ĉar en bazaroj estis malmultaj specoj de ludiloj, tial la patro aĉetis tiujn de li ofte vidatajn objektojn kiel ludilojn por ili. Poste ili interesiĝis pri antikvaĵoj. La patro kunportis hejmen rompitaĵojn imitaĵojn de antikvaĵoj, ekz. trikolora ceramika ĉevalo de Tang-dinastio kaj malgrandaj homfiguroj. Tiuj belaj ludiloj sen gambo aŭ vosto tamen plaĉis al la infanoj, kiuj ofte montris ilin al siaj kamaradoj. Dum ferioj ili vizitis la laborejon de la patro kaj observis kiel li riparas antikvaĵojn. Iom post iom ili sciigis pri riparado. Komence ili prove faris etan figuron, poste ili povis imite fari versimilajn kuprajn monerojn. Kiam ili estis dekkelk-jaraj, ili povis bone ripari antikvaĵojn gvidate de la patro.

En la laborejo de la kvara filo ni vidis ke sur murbretoj estas multaj rompitaĵoj antikvaĵoj, inkl. bronzaĵojn kaj ceramikaĵojn. Li diris, ke plejparto de la antikvaĵoj tuj elterigitaj estis pli-malpli deformita kaj rompita, kaj por ke pli multe da homoj vidu ilin, li devas ripari ilin. Ripari estas malfacile. Ekz. por ripari bronzaĵon necesas diversaj teknikoj, kaj ĉiu tekniko estas ekzameno por riparisto. Mi prenas gravuradon de bildo kiel ekzemplon. Sur aldonita parto oni gravuras bildon en stilo de la originalo. Krom desegni kaj gravuri, oni devas ankaŭ koni la stilon de desegnoj de bronzaĵoj de diversaj dinastioj, samtempe oni devas ankaŭ trovi la desegnan regulon de ĉiu antikvaĵo. Tial eĉ se parto de bronzaĵo perdiĝas, oni povas reprodukti ĝin en stilo de la originalo. Do eminenta riparisto
(Daŭrigo sur p. 47)

SERPENTO-KULTANTOJ

Teksto kaj fotoj de GUO SHI

LEGENDOJ diras, ke dio Fuxi kaj diino Nüwa estas prapatroj de la ĉina nacio. Sur iuj elterigitaj bildoj vidiĝas, ke ili estas dioj kun homa kapo kaj serpenta korpo. Iliaj vostoĵoj intervolviĝas, kio signifas, ke ilia kuniĝo produktas la homojn.

Antikve, Fujian en sudorienta Ĉinio estis regno de serpentoj. Tie, ĉu en arbaro, ĉu ĉe akvo, ĉie videblis serpentoj. Ankaŭ la lokanoj estas rigardataj kiel posteuloj de serpentoj. Ili neniam damaĝis la nigrajn boaojn. En somera nokto ofte okazis, ke serpento dormis kune kun homo. Kiam oni ellitiĝis en malluma nokto kaj tuŝis ĝin senatente, ĝi ne mordis lin. La lokanoj opiniis, ke tio estas bona aŭguro. Nun iuj kamparaninoj faras serpentforman harplektaĵon surkape kaj aliaj portas arĝentan harpinglon similan al serpento kun levita kapo, kio devenis de kulto de primitiva totemo.


Rigardante serpenton dio, Fujian-anoj konstruis templojn por diaj serpentoj kaj kultas ilin. En la antikva urbeto Zhanghu en la meza baseno de Minjiang-rivero imponas la templo Serpenta Reĝo kun kvar elstaraj tegment-randoj en formo de alte levita kapo de serpento. La urbeto estas unu el la gravaj havenoj en la baseno de Minjiang-rivero. La urbetanoj plejparte estas ŝipistoj. Preskaŭ ili ĉiuj devenis de la supra baseno de Minjiang-rivero. Ĉar tie la akvo torentas, malprofundaĵoj danĝeras, tial la ŝipanoj lertas en naĝado kaj ŝipveturigado jam de sia infaneco. Per bambustango ili sekure veturigas sian boaton preter malprofundaĵoj. Pro tio, en la dinastioj Ming (1638-1644) kaj Qing (1644-1911) oni tre ŝatis tiajn ŝipanojn, kiuj tutjare laboris sur rivero por sin vivteni kaj

pie kredis je Serpenta Dio, opiniante, ke tiu estas ilia protektanto. Do, post sia transloĝiĝo en la mezan basenon de la rivero, ili konstruis tie la templon Serpenta Reĝo. En ĝi ofte vidiĝis centoj da

serpentoj. Antaŭe, en somero kaj aŭtuno oni faris konkurson pri serpento. Tiam lokanoj, kun serpentoj volviĝintaj sur la kapo, ĉe la talio aŭ en la manoj, paradis sur stratoj kaj poste liberigis ilin en montoj.

Tiu moro jam malaperis antaŭ dekoj da jaroj. Sed nun, dum la Lanterna Festo en la 15-a de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro, Zhanghu-anoj nepre ludas kun serpentaj lanternoj. Antaŭ la festo maljunuloj kun alta prestiĝo faras la serpentajn kapon kaj voston. Unue, oni faras iliajn framojn el tabuloj kaj bambuaj slipoj, poste gluas blankan paperon al la framoj kaj fine dekoracias ilin per kolora papero. La serpenta korpo konsistas el bambuaj lanternoj faritaj de ĉiuj familioj. En ĉiuj lanternoj brilas ruĝa kandelo. Sur ili belas papertranĉaĵoj kun figuroj de birdoj, fiŝoj kaj floroj aŭ legiĝas bonaŭspiciaj vortoj por peti pacon kaj prikanti riĉan rikolton. La serpenta kapo altas je 2.5 m kaj po tri lanternoj fiksitaj sur ĉiu tabulo konsistigas unu parton de la serpenta korpo.

En la festotago, antaŭ sunsub-




Serpenta lanterno farata

iro, lokanoj kuniĝas laŭ la familia nomo antaŭ sia familia templo, kunportante siajn lanternajn tabulojn. Tie ili kunligas la tabulojn kun la serpentaj kapo kaj vosto. Ordinare la serpenta korpo konsistas el mil lanternaj tabuloj kaj longas je 1-2 km. Post vesperiĝo oni bruligas kandelojn en la lanternoj. Maljunuloj kun alta prestiĝo levas la serpentajn kapon kaj voston, en bruado de petardoj ekis la parado de serpenta lanterno.

La paradantoj preteriras ĉiujn loĝejojn. Kiam la serpenta kapo venas, ĉiuj eldomiĝas por bonveniĝi ĝin per eksplodigo de petardoj, kio aŭguras forigon de malfeliĉo kaj peton al Serpenta Dio pri bona rikolto en la venonta jaro. Jam noktiĝas kaj la "fajra serpento" jen zigzagas laŭ mallarĝaj stratoj, jen dancas sur granda strato, sekvate de gajaj loĝantoj junaj kaj maljunaj.

La spektaklo daŭras ĝis mateniĝo. Kiam la paradantoj atingas plaĝon de la rivero, la lanterno-serpento ekvolvas sin en cirkolon. La festo finiĝas per kuniĝo de la kapo kaj vosto de la lanterno-serpento. ■



1. Antaŭ parado
2. Parado
3. Serpenta lanterno
4. "Serpenta kapo"





Saluton al UEA

LA 28-an de aprilo 1998 la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), la societo "Amikoj de Esperanto", la Esperanto-sekcio de la Ĉina Radio Internacia (ĈRI), la Pekina Esperanto-Asocio kaj la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio de la Ĉina Akademio de Sciencoj kune okazigis en Pekino kunsidon omaĝe al la 90-jariĝo de la Universala Esperanto-Asocio.

La kunsidon prezidis Tan Xiuzhu, prezidantino de ĈEL. Nome de la ĉina e-istaro ŝi varme gratulis UEA kaj alte taksis ĝian kontribuon al disvastigo de Esperanto, evoluo de E-movado kaj mondpaco.

Yu Tao, prezidanto de la Ĉina Junulara Esperanto-Asocio, kiu volontulis en la Centra Oficejo de UEA 3 monatojn en 1996, diris: "UEA ludis gravan rolon en la progreso de Esperanto. UEA tute meritas esti simbolo de la internacia E-movado. Ĉiam, kiam mi konigas Esperanton al aliaj, mi mencias UEA. Tiam mi sentas, ke mi apartenas al ĝi. Mi tre fieras, ke mi estas ano de tiu granda familio." Dum restado en la CO, Yu Tao ne nur multe konis la historion de Esperanto kaj UEA, sed ankaŭ persone spertis la efikan laboron kaj sinoferemon de la oficistoj. Tio inspiras lin kaj aliajn junajn e-istojn en Ĉinio.

Prof. Chen Yuan, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA kaj honora prezidanto de ĈEL, rakontis sian intervidiĝon februare en Ŝanhajo kun la 94-jara Bakin, prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio kaj ankaŭ membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Pri la 90-jariĝo de UEA, Bakin emocie diris, ke li forte deziras fari ion por Esperanto, tamen lia sanstato tion ne permesas. Li petis Chen Yuan trans-

doni saluton al samideanoj de ĈEL kaj UEA.

Chen Yuan ne nur partoprenis la ĉinan E-movadon de la pasinta pli ol duonjarcento, sed ankaŭ aktivis kaj studis pri E-movado internacia. Li prezentis la 90-jarojn de UEA per bildigo de ĝiaj unuaj malfacilaj 40

jaroj kaj ĝiaj sekvaj fortiĝantaj 50 jaroj, donante al la ĉeestantoj bonan lecionon pri la historio de E-movado. Li rakontis siajn travivaĵojn kaj substrekis la solidarecon de nia movado precipe kiam ni e-istoj ankoraŭ ne estas sufiĉe fortaj. Li menciis en sia parolado du artikolojn pri lingvaj problemoj en la nuna internacia komunikado, skribitajn de ĉinaj ĵurnalistoj. Li trovis, ke neniu el la aŭtoroj montris ideon pri la solvo de lingvaj problemoj nek konas Esperanton. Tial li opiniis tre grava la diskonigon de nia lingvo en la nuna tempo.

Oni povas diri, ke nun UEA estas pli matura kaj pli forta ol iam ajn antaŭe. Unu el la atestoj estas, ke en 1997 Unesko asignis la statuson de operaciaj rilatoj al UEA. Survoje al la 21-a jarcento, Esperanto alfrontas ŝancojn kaj defiojn. Tiuokaze, UEA iniciatis la Kampanjon 2000 kun celoj levi la organizan kaj idean nivelon de la Esperanto-komunumo; levi la prestiĝon de la internacia lingvo; kaj influi la internacian vivon. La celoj de la Kampanjo estas tasko ne nur de la estraro kaj komitato de UEA, sed ankaŭ de la tutmonda e-istaro.



Kunsido de pekinaj e-istoj okaze de la 90-jariĝo de UEA

Reage al la Kampanjo 2000, Dai Song'en, ĝenerala sekretario de ĈEL, prezentis la planon de ĈEL por venontaj jaroj — varbi pli da asociaj kaj individuaj membroj, plifortigi la societon "Amikoj de Esperanto", diskonigi E-on en diversaj medioj, apliki ĝin en diversaj kampoj, ktp.

Parolon faris ankaŭ Yang Zhengquan, vicministro de la Informa Oficejo de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio kaj vicprezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto". Li alte taksis la laboron de EPC kaj ĈRI en komunikado kaj amikiĝo inter ĉina kaj alilandaj popoloj. Chai Zemin, prezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto" kaj unua ĉina ambasadoro al Usono, montris la gravecon de Esperanto per sia profesia vivo kiel diplomato. Li esprimis deziron daŭre klopodi por levi la prestiĝon de Esperanto kune kun aliaj simpatiantoj de Esperanto. En la kunsido parolis ankaŭ Zhang Qicheng, honora prezidanto de ĈEL kaj iama ĉefredaktoro de EPC.

La partoprenantoj opiniis, ke la plej bona donaco por UEA en ĝia festo estas sin ĵeti en ĝian Kampanjon 2000 per praktikaj agadoj. ■



Senfina vojo

Teksto de LI LIANG
Fotoj de LIU SIGONG

LOKANOJ diris: “Dum la vojaĝo en Xinjiang ne-pre vizitu Kashi kaj dum la vojaĝo en Kashi ne-pre vizitu Taxkorgan.”

Do, ni suden veturis de Hotan tra Kashi al Taxkorgan, la lasta stacio de nia vojaĝo laŭ la Silka Vojo.

“KUNEKZISTU KUN MUZTAGATA!”

La ŝoseo de Kashi al Taxkorgan estas danĝera, ĉar la nove konstruitaj ŝoseo-partoj facile detruigas de neĝakvo de sur monto kaj apude rokoj povas fali en ajna momento. Tamen survoje ni sate ĝuis la grandiozecon kaj majestecon de Pamiro: varias eroziitaj sablomontoj kaj valoj, kontinuas krutaĵoj, kaj sezona rivero silente fluas tra vasta paŝtejo. La montpinto Kongur 7 719 m super la marnivelo kaj la montpinto Muzta-


gata 7 546 m super la marnivelo imponas sub la ĉielo lazura. Nuboj ŝvebas ĉe ilia talio kaj neĝo glimas sur ilia supro. Muztagata estas rigardata kiel dia monto kaj simbolo de fiero. Ĉe adiaŭo al amikoj foren vojaĝontaj, la lokanoj kutime diras: “Kunekzistu kun


Muztagata!”

KONATIĜO KUN TAĜIKOJ

La gubernia urbo de Taxkorgan estas malgranda, sed ĝia paŝtejo vasta. El ĝiaj 27 mil loĝantoj 84% estas taĝikoj. Ili konsistigas 75% de la taĝikoj en Ĉinio kaj la


SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO





- | | | |
|---|---|---|
| 1 | 2 | 3 |
| 4 | 5 | |

1. Mastrino preparanta mang'ajon
2. Familio sur la altebenaĵo
3. Taĝikaj gejunuloj
4. Higiena kutimo
5. Rikoltado



ceteraj loĝas en suda Xinjiang.

Antaŭlonge mi aŭdis, ke taĝika pasanto lasas siajn objektojn ĉevoje kun ŝtono sur ili, kaj poste neniu alia forprenos ilin; la tiea malliberejo ekzistas nominale kaj restas vaka de multaj jaroj, por la taĝikoj seruro estas senutila...

En la sekvanta mateno post nia alveno al la gubernia urbo ni renkontis taĝikinojn, kiuj balais straton. La ĉefstrato longa je 500-600 m, borderita per altaj poploj, kruciĝas kun komerca strato. Virinoj portas robon ruĝan aŭ flavan kaj ĉapon kun eleganta brodaĵo. Ĉiuj taĝikinoj lertas en brodado jam de sia infanaĝo. Taĝikaj maljunulinoj kaj mezaĝulinoj havas unu longan harplektaĵon sur la kapo, novaj edzinoj — kvar kun blankaj butonoj kaj fraŭlinoj — kvar sen ornamaĵo.

Leviĝis la suno kaj surstrate multiĝis iom post iom pasantoj. La matena saluto estas plej intima por taĝikoj. Ili salutas ĉiam tre proksime, en agrable modulita tono. Ĝenerale, viroj reciprokas kison sur mano kaj virinoj — sur la lipoj aŭ vangoj; junuloj kisas

manplaton de maljunuloj kaj la lastaj — la frunton de la antaŭaj; rilate samaĝulojn, virinoj kisas manon de viroj kaj viroj metas sian manon sur la kapon de virinoj; kaj pliaĝaj virinoj kisas la vangon de junaj viroj.

ŜTONA URBO

La gubernia urbo sidas sur altaĵo, probable por eveti inundon de la rivero Taxkorgan en somero. Ne malproksime de la urbo etendiĝas malaltaĵo plena de dispecigitaj tegoloj kaj ŝtonoj. Laŭ rompitaĵoj de muroj mi imagis, ke tio devas esti la ruino de fama ŝtona urbo.

Konstruita de taĝikaj prauloj en Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.), la ŝtona urbo estis ĉefurbo de la regno Qiepantuo. Laŭdire, tiu ŝtona urbo estis rekonstruita en Qing-dinastio (1644-1911) kun iom malpli granda areo kaj en ovala formo. Dank' al sia solida bazo, la urbo restas sendifekta post multaj jarcentoj. Ĝi havas du partojn, kun po unu pordego en la kvar flankoj. En la supra parto estis fuortoj kaj kreneloj kaj en la

malsupra — palaco de reĝo, loĝejoj de ŝtatoficistoj kaj templo de budaismo. La urbomuroj plenas je fendoj, tra kiuj ni ŝajne vidis heroajn taĝikojn antaŭ pli ol 1 300 jaroj.

Irante sur la stepo for de la urbo, ni returnis nin por rigardi la urbon, kiu aspektis pli impona en la lumo de la subiranta suno kaj super kiu kriis agloj kvazaŭ ŝvebantaj jam kelkajn jarcentojn.

NACIO KIEL AGLO ŜVEBANTA

Taĝikoj adoras aglon. En iliaj antikvaj legendoj aglo estas simbolo de justeco; ĉiam, kiam bonkorulojn trafis danĝero aŭ malfeliĉo, aglo aperis antaŭ ili kaj sin oferis, por ke ili estu en paco. En la tagoj, kiam ni estis inter taĝikoj, ni ĉiam sentis ekziston de aglo.

Tio estis neforgesebla geedziĝa ceremonio. Ĝin ĉeestis preskaŭ ĉiuj loĝantoj de la gubernia urbo. Dum la tuta nokto junulinoj gaje tamburinis sub muziko ludata de maljunuloj per fluto. La fluto kun tri truoj estis farita el flugila osto de aglo. Ĉiuj junaj taĝikoj scias ludi ĝin. La maljunuloj flutis, por ke la ceremonio fariĝu pli solena kaj la junuloj amuziĝu pli plezure.

Ekdancis du junuloj en vesto kun desegno de aglaj flugiloj. Unu el ili alte levis siajn brakojn kvazaŭ aglo ŝvebanta kaj la alia tremigis siajn ŝultrojn kvazaŭ aglo svinganta siajn flugilojn. Kiam ili levis la kapon, ilia agla nazo distinge frapis niajn okulojn.

EN TIZNAFU

Informiĝinte, ke ni venis en Tiznafu el malproksima loko, maljunulo Roukayik afable invitis nin en sian hejmon. Li alkondukis ŝafidon, ĉar laŭ la loka kutimo gastoj devas rigardi ŝafon buĉotan. Kun krucitaj kruroj ni sidis sur la terlito kaj aŭskultis rakontojn pri taĝikoj. Apud ni estis



Agla danco



Antikva postiljona stacio

litkovriloj kaj matracoj en stako alta je du metroj. Ĉar gastoj kaj mastroj ofte babilas ĝis profunda nokto kaj tiam la lastaj certe ne lasas siajn gastojn foriri, tial ĉiuj familioj havas sufiĉe da litkovriloj kaj matracoj por eventuala uzo.

La ŝafaĵo preparita surtabliĝis. La taĝikaj viroj prenis tranĉilon de la talio kaj ektranĉis la ŝafaĵon, kvazaŭ ili skulptus artaĵon. Ili metis antaŭ nin ŝafvostan grasaĵon kaj ŝafhepaton, kiuj laŭ ili estas la plej bonaj partoj por gastoj.

La maljunulo kaj liaj du filoj loĝas kune, ĉar taĝikoj kutime vivas en granda familio. La ĉambroj de liaj filoj estas en alia flanko. La domo en tipa taĝika stilo ne havas fenestron, nur kun luko. Meze de la domo staras granda forno destinita por rosti kukojn kaj hejti la domon. Ĉirkaŭe estas

teraso alta je 0.5 m, kiu servas kiel manĝotablo.

AL PAKISTANO

En Taxkorgan ofte videblas pakistananoj, ĉar la loko distancas de la landlimo inter Ĉinio kaj Pakistano je nur iom pli ol cent kilometroj. La dogano Hongqilafu, la lasta ĉe la suda branĉo de la Silka Vojo en Ĉinio, sidas en la loko 5 100 m super la marnivelo.

Ambaŭflanke de la ĉina-pakistanana ŝoseo al la dogano allogas nemalmultaj historiaj restaĵoj: ĉe rivero sur herbejo proksime de la ŝoseo staras nove riparita postiljona stacio kun ronda tegmento; kaj ĉe monto aliflanke de la ŝoseo kuŝas ruino de la kanalo Parhad-Xilin. Laŭ historia libro, tiu pli ol-mil-jara kanalo 80 km longa estis la plej granda akvoutiliga konstruo en la loko; la fortreso


Princino renomiĝis pro sia legenda koloro, sed ni ne havis ŝancon ĝui ĝin pro malfacila trafiko.

Ĉe la montpasejo Hongqilafu hurlas frosta vento, tuj apude staras neĝmontoj, ambaŭflanke de la limŝtono postenas gardostarantoj ege afablaj. Ili neniam rifuzas inviton al kuna fotado. La veturiloj pasantaj tra la landlimo laŭvice atendas kontroladon antaŭ la posteno. Pakistanaj komercistoj venas en Ĉinion ofte en lundo kaj vendredo. Kelkfoje ili veturas per ĉaro.

Ŝajnas al ni, ke tie la vojo atingas sian finon, sed efektive ĝi etendiĝas foren, al Centra kaj Suda Azio kaj eĉ al pli malproksimaj landoj. Ĝi ankaŭ kondukas al la venonta jarcento, kunligante la hieraŭon kaj morgaŭon kaj la kulturojn de la Oriento kaj Okcidento. ■



Sur la Ĉina-Pakistana Ŝoseo



En doganejo



Ruino de la ŝtona urbo



Antikvaj tomboj



La ĉielo en la okuloj de antikvaj ĉinoj (I)

de PANG BIAN

ANTIKVAJ ĉinoj opiniis, ke la ĉielo estas la plej granda kaj la plej alta. La ĉina ideogramo 天 (ĉielo) konsistis el 一 (unua) kaj 大 (granda) kun signifo de “senlima grandeco” kaj “senlima alteco”. Tial, ili konis la ĉielon pere de alternado de la kvar sezonoj kaj irado de la steloj.

NATURO DE LA ĈIELO

En la prahistorio ĉiuj ŝanĝiĝoj de la naturo, ĉu grandaj ĉu malgrandaj, kaŭzis maltrankvilon de homoj, ĉar ili havis striktan rilaton kun la homa vivo: Vintre la sunlumo portis al ili varmon, somere pluvego kaŭzis inundon kaj forrabis de ili la loĝejon... Sunlumo, pluvo kaj neĝo devenas de la ĉielo, tial ili opiniis, ke la ĉielo estas reganto de la universo. Ĉio en la universo naskiĝis laŭ volo de la ĉielo. Tiu, kiun la ĉielo volas fari reganto, estas imperiestro. La imperiestro ja regas la homan socion en la nomo de la ĉielo, tial la popolo devas obei lin senkondiĉe. Ankaŭ la imperiestroj kredis al la volo de la ĉielo. Foje la unua imperiestro de la Okcidenta Han-dinastio Liu Bang (206-194 a.K. sur la trono) grave malsaniĝis. Lia edzino volis venigi kuraciston, sed Liu diris, ke li suverenas kaj malsanas laŭ la volo de la ĉielo, kaj kontraŭ tio kuracisto povas fari nenion.

La teorio de ĉiela volo naskiĝis en pratempo, tamen ĝi ne estas la unika aserto de la antikvaj ĉinoj pri la ĉielo. Xunzi (313-238 a.K.), granda pensulo de la periodo Militantaj Regnoj, opiniis, ke irado de la suno kaj luno, alternado de la kvar sezonoj, vento, pluvo kaj kresko de ĉiuj vegetaĵoj estas naturaj fenomenoj. La ĉielo ne estas dio.


Wang Chong (27-97 p.K.), filozofo de la Orienta Han-dinastio, diris, ke samkiel la tero, ankaŭ la ĉielo estas korpo. Ĝi, je dekoj da miloj da kilometroj super la tero, havas neniun volon kaj ne povas fari spiritan efekton al la homoj. Laŭ li, se la ĉielo koleras per tondro kaj ĝojas per pluvo, kial do ĝi ofte

ĝojas kaj koleras samtempe? Ĉu ĝi estas freneza? Se la ĉielo ofte faras tondron por puni krimulojn sur la tero, kial ĝi ofte tondrumas ŝafojn en arbaroj, sed ne senkompatajn buĉistojn? Ĉu la ŝafoj estas krimaj?

Laŭ Wang Chong la ĉielo havas formon. La konstelacioj en la ĉielo estas ripozejoj por la suno kaj luno, kiel postiljonaj stacioj sur la tero por poŝtistoj. Poste iuj montris, ke la ĉielo estas senlima kun neniun formo, dum la suno, luno kaj steloj ne havas devenon kaj agas ne tute same. Ilia irado kaj halto dependas de la aero. Zhang Zai (1020-1077), filozofo de la Norda Song-dinastio, opiniis, ke la ĉielo ja estas aero kaj la leviĝon de la suno kaj luno en la oriento kaj ilian malleviĝon en la okcidento kaŭzas ne la rotacio de la ĉielo, sed tiu de la tero. Jen la unua fojo, ke antikvaj ĉinoj metis la tezon pri la rotacio de la tero.

FORMO DE LA ĈIELO

Jam antaŭ pli ol 3 000 jaroj an-



Antikva observatorio en Pekino

tikvaj ĉinoj inventis ĉaron. Por ŝirmi sin de pluvo kaj vento ili tegmentis ĝin. Pro tio iuj opiniis, ke la tero similas al la ĉaro, dum la ĉielo al la tegmento. En iliaj okuloj la ĉiela tegmento estas volba kaj ŝvebas super la tero.

Aliaj supozis, ke la tero similas al kvadrata ŝaktabulo, dum la ĉielo al la ronda kovrilo, tio ja estas la tezo pri la ronda ĉielo kaj kvadrata tero. Tiu koncepto montriĝas ankaŭ en formo de tomboj de hanoj: La rektangula kavo aludas pri la tero, dum la ronda teramaso pri la ĉielo. Sur iuj ĉerkoj pentriĝis pordo, fenestroj kaj gardistoj, tio montras, ke la hejmo de la mortinto daŭre troviĝas inter la ĉielo kaj tero. Antikvaj ĉinoj faris rondan teramason altaro por kulti la ĉielon, dum la kulta ceremonio oni portis kostumojn kun broditaj suno, luno kaj steloj por fandiĝi kun la ĉielo. Ili prenis ankaŭ la teramason kiel kultejon de la tero kaj metis ĝin en akvon, opiniante, ke la akvo kaj tero formas la terglobon. La

Ĉiela Altaro en Pekino konstruita antaŭ 400 jaroj ja estas ronda halo kaj la Tera Altaro — kvadrata konstruaĵo. Antaŭe ĉi tiu estis ĉirkaŭita de akvo.

Kaj triaj opiniis, ke la tuta universo similas al ovo. En la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-25 p.K.) oni faris ĉielglobuson kun signitaj konstelacioj sur ĝi. Oni klarigis per la globuso, ke kiam la suno elteriĝis, tagiĝis kaj post ĝia enteriĝo noktiĝis. Poste Wang Chong neis tiun ĉi tezon, dirante, ke se la suno vere enteriĝas, do kial oni povas ĉerpi akvon el la tero? Ĉu la suno iras en akvo? Li opiniis, ke la suno rivoluas laŭ difinita direkto, sed ne enteriĝas. Nelonge post Wang, Zhang Heng, alia fama sciencisto, aldonis ion gravan al la teorio de la ĉielo-sfero. Li diris, ke la ĉielo similas al ovoŝelo, dum la tero al ovoflavo, tial la ĉielo rivoluas ĉirkaŭ la tero.

Laŭ la teorio de la ĉielo-sfero en la tuta mondo la tago kaj nokto ne nur estas samlongaj, sed ankaŭ okazas samtempe. Post la 7-a jc., kiam armeo de Tang-dinastio ekspediciis norden, oni trovis, ke tie la tagoj estas longaj, dum la noktoj daŭras nur unu aŭ du horojn. Pro tio oni malkovris eraron de la teorio de la ĉielo-sfero.

Kompare kun tiu teorio, la tezo pri la ĉielo kiel tegmento estas preskaŭ scienca. Laŭ tiu tezo la ĉielo estas ronda tegmento kaj la suno iras sur ĝi laŭ certa orbito. Oni supozis, ke sur la ĉielo estas 7 cirkloj kun sama centro. Kiam la suno atingas ekstreman nordon, la nordo estas en tagmezo, dum la sudo en noktomezo kaj sekve ankaŭ la tago kaj nokto estas en malsamaj horoj en diversaj lokoj. Kaj kiam la suno atingas la internan sferon plej proksime de Arkto, estas somera solstico en ĝi kaj la tago estas la plej longa kaj varma. Kiam la suno atingas la eksteran sferon plej malproksime de Arkto, estas vintra solstico en ĝi kaj la tago estas la plej malvarma kaj mallonga. Kiam la suno atingas la mezan sferon, la tago estas longa samkiel la nokto kaj la vetero estas ne varma nek malvarma. Tiam estas ekvinokso

printempa aŭ aŭtuna. Tiu teorio havas ion komunan kun la moderna astronomio. La interna sfero sur la ĉiela tegmento similas al tropiko de la Kankro, dum la ekstera al tropiko de la Kaprikorno kaj la meza al ekvatoro. Laŭ la tezo pri la ĉielo kiel tegmento la loko, kie la tago daŭras 6 monatojn kaj la nokto ankaŭ tiom longe, kaj somere glacio ne degelas, ja estas nenio alia ol Arkto, dum la loko, kie greno dufoje maturiĝas en la jaro, kaj vintre verdas herboj, ja estas la tropikaj zonoj proksime al ekvatoro. Modernaj astronomoj opinias, ke tio ne estas hazardo, sed la rezulto akirita de antikvuloj probable en Arkto kaj tropikaj zonoj. Sed kiamaniere ili atingis la lokojn antaŭ miloj da jaroj?

ORIGINO DE LA ĈIELO

En la komenco oni opiniis, ke la ĉielo estis kreita de dioj. Antaŭ naskiĝo de la ĉielo, en la tuta universo regis granda haoso, kaj poste aperis du dioj, kiuj malfermis la ĉielon kaj teron. Poste cirkulis alia mito, ke la universo estis ovoforma kun la dio Pan Gu ene. Li faris la klaran aeron supren, tio ja estis la ĉielo, kaj la malklaran malsupren, tio ja estis la tero. Jen la ĉielo apartiĝis de la tero. Kaj poste la korpo de Pan Gu kreskis kun levigo de la ĉielo kaj dikiĝo de la tero. Tiamaniere forpasis 18 000 jaroj, la ĉielo fariĝis ekstreme alta kaj la tero ekstreme dika. Tiam mortis Pan Gu. Sed lia dekstra okulo fariĝis la luno, lia maldekstra — la suno, liaj dentoj — steloj, liaj kvar membroj — altaj montoj, lia sango — rivero kaj maro, liaj haroj — arboj kaj herboj.

En la periodo Militantaj Regnoj naskiĝis granda filozofo Zhuangzi (369-286 a.K.). Li opiniis, ke la ĉielo, tero kaj homoj devenis de aero, origino de la tuta universo. Post kelkaj jarcentoj iuj metis jenan tezon: la aero devenis de akvo, origino de la tuta universo kaj kompreneble, la ĉielo, suno, luno kaj ĉiuj steloj devenis de la akvo.

Wang Chong opiniis, ke la ĉielo kaj tero ne havas naskiĝon nek



morton. La ĉielo ĉiam restas la sama estinte, estante kaj estonte. Laŭ li la ĉielo estas neŝanĝiganta. Tamen multaj opiniis, ke la ĉielo kaj tero havas sian originon kaj pereon. En Ĉinio cirkulas jena fablo: Iu timas disfalon de la ĉielo kaj rompiĝon de la tero. Ĉar tiaokaze li povas nenie vivi, li do maltrankvilas tuttage. Lia amiko diris, ke la ĉielo estas akumulita aero, kiu ne povas fali teren, tamen la maltrankvilanto kontraŭdiris: “Ĉu la steloj povas ne fali, se la ĉielo estas el aero?” La amiko respondis, ke la steloj estas lumantaj objektoj, kiuj ne vundus la homojn, eĉ se ili falus. La maltrankvilanto diris, ke la ĉielo kaj tero ja povas detruigi, sed pro sia grandeco ili detruigis malrapide kaj oni certe maltrankviliĝos ĉe ilia detruigo. La fablisto opiniis, ke detruigo de la ĉielo kaj tero ja ne estas malbona afero, ĉar kiam pereos la nuna mondo, naskiĝos la nova kaj la homoj eble vivos pli feliĉe en la nova mondo.

Laŭdindas, ke jam antaŭ pli ol 2 000 jaroj la homoj havis tian koncepton pri la ĉielo kaj tero. En la 1-a jc. sciencisto Zhang Heng montris, ke la universo estas senlima. En la 13-a jc. laŭ makroskopa vidpunkto iu erudiciulo eksplikis la koncepton pri la universo. Li diris, ke en la patrina ventro oni ne scias, ke ekstere estas granda mondo kun multege da homoj. Laŭ li en la senlima universo estas multaj mondoj, en ĉiu el ili la homoj naskiĝas kaj mortas kaj ankaŭ la ĉielo kaj tero naskiĝas kaj mortas, sed en malsamaj tempoj, ili ŝanĝiĝas senfine.



Modernaj sciencistoj observas stelojn per teleskopo kaj sciiĝas, ke ekster la suna sistemo estas aliaj sistemoj en Galaksio kaj ekster Galaksio estas aliaj similaj kosmaj unuoj. Tio ja konformas al la supozo de niaj antikvuloj. De antikve UFO foje refoje vizitas nian terglobon, kio montras eblecon, ke vivas homoj sur alia planedo. Kompreneble antikvaj ĉinoj multe esploris la ĉielon. Ilian observadon de la suno, luno kaj steloj kaj ilian supozon pri ili mi konigos al vi en la septembra numero de nia revuo.

Surdmuta amanto de pekina opera

Teksto kaj fotoj de WANG YAO



1. Presentado
2. Aŭskulto de la surbendigita voĉo de la patro
3. Ekzercado ĉie ajn
4. Provludo
5. Antaŭ prezentado



Antaŭ nelonge en Ĉinio okazis la 4-a Arta Prezento de Handikapuloj. Inter la prezentantoj estis Qiu Erming, filo de Qiu Shengrong, majstro de pekina opero.

La 36-jara Qiu Erming de la infaneco estas amanto de pekina opero. Ofte li imitis ludon de aliaj. Bedaŭrinde en sia infaneco li perdis la patron kaj surdmutiĝis pro malsano.

Poste la kultura departemento de Ĉinio disvolvis la arton de pekina opero tiamaniere, ke disĉiploj ludu laŭ surbendigitaĵoj de la majstroj. Tio vekis en Qiu

Erming la deziron, kiun li havis en la infaneco: prezenti sur scenejo. Li aĉetis fonoforon kaj sin trejnigis en prezento laŭ la surbendigitaĵoj de sia patro. Finfine li ellernis du kompletajn pecojn de pekina opero.

Li gajnis premion pro sia bela prezento. Starante sur scenejo, li vidis kontentigan rigardon de la spektantoj kaj gajan mienon de siaj familianoj. Li faris gestojn, kiuj signifas: "Nun estas la plej emocia kaj neforgesebla momento en mia vivo!"

Vivo estas en alia loko

de XIANG HONG

“Vivo estas en alia loko” estas romano de ĉef-devena verkisto Milan Kundera eldonita en 1973. Ni tiel titolis tiun ĉi artikolon opiniante, ke tio trafe priskribas la staton de tiaj homoj, kia la jena menciito: Por realigi sian revon pri artistigo, steluliĝo, riĉiĝo aŭ famiĝo, nemalmultaj junuloj venis en Pekinon kaj vivas sen oficiala posteno, sen stabila enspezo kaj sen konstanta loĝloko. For de la naskiĝloko kaj for de la idealo ili neeviteble ofte dronas en konfuziĝo: “Por kio mi vivas?”

Yu Tao

ANTAŬLONGE mi intencis iom skribi pri Neil Zhang, amiko sincera kaj komercisto revanta pri pentristiĝo.


Sed Neil Zhang, mi pensas, ne volas ke mi nomu lin komercisto. Kvankam en 1994 li sin turnis al komercado kaj finfine fondis sian propran kompanion pri entrepreno-figuroj, kaj negoco kaj komercistoj-klientoj rabis de li multe da tempo, tamen li neniam agnoskis sian komercistiĝon. Fakte li ne meritas esti kompetenta komercisto. Li konsciis, ke profito estas celo de komercado, sed li ofte emis kooperi laŭ arta intereso kaj personeco pli ol profiti. Tio kompreneble malhelpis la disvolviĝon de lia kompanio.

Tial ne strangas ke li kriis “trafe,” kiam mi diris al li dum nia lastatempa renkontiĝo: “Mi volas skribi artikolon pri vi por

nia revuo. La titolon mi jam elpensis — Vivo estas en alia loko.” Zhang ne estas lerta en komercado, ĝustadire li estas antagonisma kontraŭ komercado. Kial do li ne elektas pentradon kiel sian okupon? Se tiel, eble li estas pli ĝoja.

Pri la demando Zhang povus respondi: “Malfacile.” Jes, kiom da personoj povus sin vivteni per vendo de pentraĵoj?

Antaŭ komercado Zhang vivis kelkajn jarojn en Pekino kiel migranta pentristo. Li estis unu el la fondintoj de la “pentrista vilaĝo” proksime al la fama Yuanmingyuan-ĝardeno (Vidu la artikolon “En la pentrista vi-




Neil Zhang

laĝo”, 8-a numero, EPĈ, 1993). Tie estas antaŭurbo kaj la lupago por domo estis malalta. Poste li transloĝiĝis foje-refoje preskaŭ en ĉiujn antaŭurbojn de Pekino, pli kaj pli for de la urbocentro. Malgraŭ malkomforteco lia pentrado en tiu periodo estis fruktodona. Liaj tiamaj olepentaĵoj, plenaj de idealismo, plejparte temas pri filozofio, pri diferenco

inter la orienta kaj okcidenta kulturoj. La abstrakta enhavo, lerta peniktuŝo kaj brilaj koloroj videbligas patoson de la verkinto. Tiajn olepentraĵojn ŝatis okcidentanoj loĝantaj en Pekino. La pentraĵ-vendo ebligis al li vivi komforte. Ofte li estis senmona. Iam li estis tiel mizera ke li travivis unu semajnon nur sin nutrante per kilogramo da nude-lo. Lia amatino, tiam ankoraŭ ne diplomiĝinta el altlernejo, de tempo al tempo donacis al li vivandon. Tamen por Zhang la plej granda ĉagreno estis devigite forvendi siajn pentraĵojn, en kiujn li enverŝis siajn amon kaj entuziasmon. Tiel li ofte trovis sin en embaraso: Se neniu aĉetus lian pentraĵon, mizera vivo atendus lin; se liaj pentraĵoj forvendiĝus, li sentus doloron.

La influo el du flankoj igis lin ĉesi pentri kaj sin dediĉi al komerco. Unuflanke estis liaj pentristoj-amikoj. Komence de la 90-aj jaroj, tiuj, kiuj iam kun li en la "pentrista vilaĝo" diskutis pri filozofio kaj pentra stilo, unu post alia iris alilanden aŭ sin ekokupis pri komercado. En la komerca tajdo ili perdis la paciencon teni la artan pozicion. Ili fondis tiajn aŭ aliĝis al aliaj kompanioj, ne preterlasante iun ajn okupon profitodonan. Iom post iom iliaj vizaĝoj radiis pro sufiĉe da nutraĵoj, laŭmodaj kaj elegantaj kostumoj montris ilian memfidon. Vizaĝe al la sukceso de la amikoj, Zhang fariĝis malforta. Ŝajne ne eblis daŭrigi la vivon nur kun pentrado.

Aliflanke estis lia amatino Jiang. La gepatroj de Jiang, licenciuloj de la 60-aj jaroj, estas ortodoksaj kaj konservativaj. Iun someran tagon, la filino hejmen revenis el somerumejo Beidaihe kun nova konato, kiu kun longa hararo kaj stranga kostumo pre-



Neil Zhang kaj Jiang

tendis, ke li estas artisto. Ili neniel povis ŝati tiun junulon kaj bedaŭris lasi la filinon iri al Beidaihe. Jiang estis obeema, sed ĉi-foje ne cedis al siaj gepatroj, ĉar ŝin allogis la talento kaj bonkoreco de Zhang. Ŝi donis al li helpon, kiam li bezonis. Por ŝi, diplomiĝinto el la ekonomika fakultato de la Ĉina Popola Universitato, estas ne malfacile trovi altsalajratan postenon. Ankaŭ Zhang klare konsciis ŝian sendependecon en financo. Tamen konsiderante la komunan estontecon, Zhang konsciis sian respondecon, ĉar en ilia venonta familio kanvasoj ne taŭgos por domo nek por lito.

Tiuokaze Zhang flankenmetis la penikon, kiun li ekprenis en sia 7-jara aĝo, kaj fariĝis komercisto. Kelkaj jaroj pasis. Nun Zhang aspektas kiel aliaj komercistoj, kun konvenaj hararanĝoj kaj kostumo. Ĉe la unua renkontiĝo li kutimis prezenti sian vizitkarton. Kompreneble la gepatroj de Jiang jam akceptis lin.

Sed pentrado, lia denaska

amo, samkiel manĝado, ĉiam alvokis lin. Ofte en profunda nokto li forŝteliĝis de la dormanta Jiang, trovis angulan sidlokon en bufedejo, drinkis kaj meditis pri pentrado. Nur en tiu momento li sentis sin proksimiĝanta al sia memo, sen malpacienco.

Jiang tute komprenis lian embarason:

“Ŝajne ni ambaŭ aktoras sur scenejo. Neil ne povas tutanime roli, kvankam li scias la scenaron. Pro kontraŭvoleco li dronis en doloro. Ĉar mi klare vidas lian doloron kaj ne povas helpi lin, mi sentas duoblan doloron.”

En 1998 la kompanio de Neil Zhang komencis profiti, kio ebligis al li lui domon kiel atelieron en antaŭurbo. Kiam venis semajnofino, li havis liberan tempon kaj bonan humoron iri tien por sperti ĝojon de verkado. La oscedantaj figuroj kaj laciĝintaj vizaĝoj sur liaj pentraĵoj montras, ke la komercado en tiuj jaroj influis lian pentran stilon de abstrakta belo al io reala.

Kiel nomi la nunan Neil Zhang, mi ne scias: komercisto aŭ pentristo? Aŭ ambaŭ? ■

Flegistino Zou



Zou Ruifang

En hospitalo de Zhejiang (Ĝeĝjang), Ĉinio, estas pli-ol-60-jara flegistino Zou Ruifang. Ŝi laboris jam 48 jarojn.

Foje, en la hospitalo kuŝis suferanto de gravega stomakokancero. Lia malsano estis tiel serioza, ke ne eblis operacii lin, kaj liaj fekado kaj urinado jam estis nereteneblaj. Zou Ruifang do purigis lin foje refoje. Tenante ŝiajn manojn, la malsanulo povis diri nenion de emociiĝo kaj liaj okuloj plenis de larmoj.

Zou Ruifang diris: “Flegologio estas tekniko kaj scienco, tial krom amo al ĝi, flegisto devas posedi ankaŭ altan teknikon.” Por plibonigi la flegadon, en 1980, post kiam ŝi ekfunkciis kiel estrino de la departemento por flegado, ŝi komencis kulturi la ĉefflegistojn, normigis uzadon de flegtekniko kaj difinis ekzamenajn regulojn de kvalito. Surbaze de multjara praktiko ŝi verkis la librojn “Ĉefaj Punktoj de Flegado”, “Teorio de Flegado”, “Memlerna

Fotoj de YANG XIUYUN



Zou Ruifang kaj lernantinoj de kolegio de flegistinoj

Referenco por Flegistoj” kaj “Manlibro por Elhospitaliĝintoj”.

En 1983 ŝi estis honorita de la Ministerio de Publika Sano de Ĉinio per la titolo de tutlanda eminenta laboranto, en 1988 ŝi estis elektita kiel tutlanda modela flegistino kaj en 1995 ŝi gajnis la plej altan premion por flegistoj de la mondo — Premion de Florence Nightingale.



Ruifang



En infanmalsanula ĉambro



Zou Ruifang en flegado

Zou Ruifang kaj ŝia edzo



En la Tago de Flegistinoj Zou Ruifang metas ĉapon sur la kapon de novaj flegistinoj.

VIZITO AL MARFUNDO

Hainan-provinco ĉirkaŭita de la Suda Ĉina Maro situas en subtropika zono. En la urbo Sanya en suda Hainan estas bela Yalongwan, kie ĉarmas verdaj montoj, blua akvo, blanka sablo kaj groteskaj rokoj. Por allogi turistojn, oni starigis tie muzeon de konkoj kaj ĝardenon de papilioj kun pli ol 500 specioj. Kaj la programo viziti marfundon plej plaĉas al la turistoj.

Multaj turistoj ŝatas viziti marfundon per merga kesto. Ĝi, kun oranĝa koloro, estas lokita sur submarŝipo. La ŝipo subakviĝas 10 metrojn kaj la du lumiloj de la merga kesto prilumas koralajn rifojn, kiuj similas al cervaj kornoj kaj florantaj krizantemoj ruĝaj, flavaj, blankaj...

Tropikaj fiŝoj naĝas inter la koralaj rifoj. Longe vivantaj inter la rifoj, ili havas fiksan terenon. Aktivaj fiŝoj vivas en la meza kaj supra tavoloj de akvo ĉirkaŭ la rifoj. Holoturioj kaj omaroj vivas en rifo-kavernoj. Longformaj fiŝoj tage dormas en la korpo de holoturioj kaj nokte elnaĝas serĉi manĝaĵon. Jen kunvivado de mar-estaĵoj.

En la merga kesto oni havas vidkampon nur 20-30-metran, tamen oni ĝuas neordinaran pejzaĝon. Se iu volas libere naĝi sur la marfundo, li povas lui skafandron. Post trejnado li fariĝos "submarŝipano".

"BAMBUA MARO"

En suda Sichuan-provinco estas 40-kvadratkilometra "bambua maro". Sur ĉ. 500 montetoj kreskas bambuoj de 22 specioj, kiuj radias freŝan verdon. Tie produktiĝas printempaj kaj aŭtunaj bambuŝosoj delikataj kaj karnodikaj. Post sekiĝo la prilaboritaj ŝosoj estas tre taŭgaj manĝaĵoj konservataj hejme, aŭ donacataj al amikoj, aŭ vendataj al aliaj lokoj.

Unu kaj duonan monatojn post la apero de la ŝosoj, filostakio (*Phyllostachys pubescens*) iĝas 10-metre alta. Post 4 ĝis 6 jaroj ĝi estos matura.

Ĝenerale bambuoj estas verdaj. Tamen tie estas malalta flava bambuo kun tri verdaj linioj de malsupre supren similaj al kordoj. Oni nomas ĝin kordo-bambuo. Estas speco de bambuo kun blanka pulvoro. Kiam oni tuŝas ĝin, la mano ricevos pulvoron. La fenikso-vosta bambuo kun etendiĝanta supro estas tre originala.

Lokaj maljunuloj tre ŝatas bambuan pipon 0.5-metre longan aŭ etan kiel fingro. En bazaroj aĉetebblas diversaj bambuaj metiartaĵoj kaj videblas virinoj kun bambua mansaketo aŭ korbo. En iliaj dorsaj korboj sidas iliaj infanoj, kiuj havas bambuan ludilon en la mano.

Oni povas piede trairi la bambuan maron. Estas telfero, kiu transportas la vizitantojn super la bambua maro.

MONDAJ KULTURAJ HEREDAĴOJ EN ĈINIO

En 1997, klasikaj ĝardenoj de Suzhou kaj antikvaj urboj Lijiang de Yunnan kaj Pingyao de Shanxi eniris en la Unesko-Liston de Mondaj Kulturaj Heredaĵoj. Nun 19 pitoreskaj kulturaj vidindaĵoj de Ĉinio estas enskribitaj en la liston.

Dayan estas antikva parto de Lijiang. Ĝi formiĝis fine de la 13-a jarcento. Ĝi estas ĉirkaŭita de verdaj montoj. Ene de ĝi fluas riveroj, ĉe kiuj etendiĝas la stratoj. Ĝiaj loĝantoj estas konservantoj de la antikva naŝi-a kulturo. Ĝi havas la naŝi-an hieroglifon kaj klasikajn verkojn en Dongba-lingvo, kiuj estas gravaj atestoj de evoluo de




Antikva turo en Pingyao

homa kulturo.

Pingyao estas la plej bone konservata el la 500 antikvaj urboj en Ĉinio. Plej rigardindaj estas ĝiaj urbomuroj el grizaj brikoj kaj ĝiaj domoj, kioskoj, temploj kaj kortoj en stiloj de Ming- kaj Qing-dinastioj.

En la listo estas ankaŭ aliaj ĉinaj vidindaĵoj: la Granda Muro kaj Imperiestra Palaco en Pekino, Mogao-ŝtonkavernaro en Dunhuang, Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio kaj ĝia Terakota Legio en la provinco Shaanxi, loĝloko de Pekin-homoj en Zhoukoudian, Taishan-monto en Shandong, Huangshan-monto en Anhui ktp.



Yalongwan

ESPLORO PRI PANDO

Antaŭ 4 jaroj prof. Pan Wenshi de la Pekina Universitato metis radiosendan ringon sur la kolon de pando Jiaojiao por esplori ĝian vivon en la naturo.

Kiam aliaj pandoj suriris monton por serĉi manĝaĵon, Jiaojiao iris malsupren. Ĝi gravediĝis kaj estis akuŝonta. Ĝi ekloĝis en kaverno. Ĉiutage ĝi nur dormis, ne manĝis nek trinkis. Kelkfoje ĝi eliris por preni branĉon de arbo aŭ bambuo kaj konstruis sian "akuŝejon".

Ĉ. 20 tagojn poste, ĝi naskis idon. Ĝi enmane portis la idon kaj lekis ĝin foje-refoje. Prof. Pan opiniis, ke post 4 monatoj Jiaojiao forlasos la kavernon kaj ekvivos en bambuaro kun la pandido. La unu-jara pandido kun 32 dentoj komencis manĝi bambuon, tamen ĝi ĉiam bezonis akompanon de la patrino.

Post esplorado prof. Pan opiniis, ke pandoj ne havas konstantan edzon aŭ edzinon, tamen ne troviĝas sekvaĵo de parenca pariĝo. Analizo montras, ke la genetika abundeco de pando ne estas influata de tia pariĝo.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizo kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Membroj (12-40j.) de la Esperanto Sekcio de Christ King College dez. kor. tm. pri diversaj temoj. Adr.: U. Zeiter Perera, Esperanto Sekcio, Christ King College, Tudella, Jaela, Srilankao.

* S-ro Mostefa Farrokhi, teknikisto kaj E-komencanto, dez. kor. kun geesp-istoj en Ĉinio kaj la tuta mondo kaj kolektas bildkartojn. Adr.: P.O. Box 75135-1133, Boushehr, Irano.

* Universitataj esp-istoj en Irano ŝatas interrilatiĝi kun alilandaj universitataj geesp-istoj por interŝanĝi desegnaĵojn kaj iujn ajn esperantaĵojn ekzemple E-leterojn kaj simile. D-ro Saiid Pakravan, P.O. Box 199, IR-69135, Borujerd, Irano.

* Afshin Rasouljan, 26-jara studento, dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: No. 14, Hodayun Line, SH. Rajayi Street, IR-69156, Borujerd, Irano.

* Babak Rasoulan, 27-jara magistro de angla literaturo, dez. kor. tm. pri literaturo, filozofio, psikologio, kino kaj komputilo. Adr.: P.O. Box 165, Borujerd, Irano.

Paco-kompanio servas al vi

La Paco-kompanio (Ĉinio) por konsultiĝo pri internacia afero

Servas al investantoj, turistoj kaj fakuloj:

Importo kaj eksporto de komercaĵoj;
Laboro en Ĉinio; internacia geedziĝo.

Adr.: Direktoro Ling Bo, P.O. Box 2, CN-230001, Hefei, Ĉinio.

Tel/Fax: +86-551-2632545; +86-551-4484606

Hejmpaĝo: <http://www.online.ah.cn/pac/>

Ret-poŝto: cnhflib@public.hf.ah.cn

Printempo por maljunuloj

EN mia cerbo estas tia memoro: printempe en milda vento oni per malpezaj paŝoj iris tra stratoj kaj ofte renkontis maljunulojn kun kvieta mieno sidantajn sur faldebla skabelo senmove sunumate. Tiam mi pensis, ke printempo ne apartenas al maljunuloj, sed en la lastaj tagoj mi konatiĝis kun grupo da maljunuloj, kiuj en belaj vestoj, per facilaj paŝoj iras sur T-forma scenejo, nur tiam mi konsciis ke la memoro temis pri la historio antaŭ 20 jaroj.

La grupo estis gvidata de koretna maljunulino Kim Yongza. Mi intervjuis ŝin en ordinara kvadrata korto. Kvankam ŝi estas 60-jara, tamen ŝiaj okuloj estas brilaj kaj rido — dolĉa.

En la 80-aj jaroj, en Ĉinio aperis modelinoj, kiuj profesie montras belecon de vestoj, Kim pensis, ke ŝi kaj la samtempuloj portis vestojn bluan kaj grizan jardekojn kaj pale pasigis la plej belajn jarojn de la vivo. Nun la ekonomiaj kondiĉoj ebligas al maljunulinoj sin beligi. Ŝi interkonsiliĝis kun siaj amikinoj, kiuj tuj montris sian aprobon. Ili kune fondis grupon de maljunaj modelinoj el diversaj rondoj. Ŝi diris: “La maljunuloj plejparte dikiĝis, tial ni devas emfazi niajn temperamenton kaj klerecon.” Nun 10 jaroj pasis, la grupo famas en Pekino. Antaŭ nelonge iu pekina vesta kompanio dungis la grupon. Pro tio multaj famaj modeloj aliĝis al ĝi. La grupo grandiĝis. Prezantante kune kun ju-

naj modeloj, ili akiris pli varman aplaŭdon. “Kvankam ni aspektas ne tiel belaj kiel junulinoj, tamen ni havas pli maturan temperamenton.” Parolante pri sia prezento, ŝi aspektis fiere. Feliĉe mi spektis ilian prezenta-

don. En ĉina robo ili bone montris la ĉarmecon de orientaj virinoj. Ilia vivoplana psiko sentigis min, ke printempo apartenas ankaŭ al maljunulinoj.

Semajnofine la grupanoj kolektiĝas por ekzercado. Inter ili la 70-jara Sun Chang estas plej aĝa, kvankam ŝi estas nur 1.6 metrojn alta, tamen ŝia eleganco kaj perfekta prezentado vekis varman aplaŭdon. La 64-jara Fu Sula viglis en la grupo jam 10 jarojn. Ĉe la prezentado, ŝia naiva rido ofte kortuŝas spektantojn. Inter la grupanoj mi vidis intiman maljunan paron, kiu ofte aperas en televidaj reklamoj. Wang Huizhong, la edzino, diris: “Post emeritiĝo, same kiel aliaj maljunulinoj mi min okupis je dommastrumado: aĉeti legomojn, prepari manĝaĵojn, prizorgi infanon ktp.” Foje ŝi informiĝis pri la maljunaj modelinoj en televido kaj multe pen-



Maljunaj modelinoj

sis. Unuafoje en sia vivo ŝi surhavis modan veston, ruĝigis la lipojn kaj kuraĝe eldomiĝis. Surstrate neniu konato rekonis ŝin. Ŝi sin rekomendis al la grupo kaj revenis hejmen memfide. Ŝiaj gefiloj kun ĝojo diris ke ŝi aspektas pli juna je 20 jaroj. Ŝi kun rideto montris sian edzon kaj diris: “Kvankam li diris, ke mi tro beligas min en mia aĝo, tamen li aĉetis por mi vestojn, eĉ aliĝis al la grupo.” Ŝia edzo serioze diris: “La grupo estas amatora, la membroj ne povas kompari sin kun la profesiaj. Tamen la prezentado riĉigas mian vivon. Multaj ŝatas ĝin, ne nur por ĝuado, sed ankaŭ por inspiro.”

Antaŭ granda spegulo la grupanoj serioze ekzercis sin. La sceno rememorigis min pri jenaj vortoj: “Ĉiu periodo en la homa vivo estas bela. Maljuneco ja ne estas timinda.” ■

Solvo de la enigmo "Esperanto"

Ni ricevis multajn solvojn de legantoj post publikiĝo de la enigmo "Esperanto" de s-ro Wei Peijiang en la 10-a numero de 1997. Estas elstaraj la solvoj de Clary Francoise el Francio, Shen Guangmeng kaj Li Lianzhong el Ĉinio. Bonajn solvojn donis Antero Harju el Finnlando, Konjasova S. V. el Rusio kaj Wang Peiyan el Ĉinio. Ni gratulas ilin, kaj ili ricevos memoraĵon.

Ni petis plenigi la kvadratojn per geografiaj nomoj, sed iuj legantoj ne tute tiel faris. Jen la solvo de la elpensinto de la enigmo:

Ĉ	I	N	U	J	O	L	I	M	P	A	F	R	I	K	C	I	T	E	R	G	V	I	N	E
E					S					L			I		I					A				R
Ĥ	A	L	D	E	L	A	G	O	S	Ĝ	I	B	U	T	D	A	N	U	J	B	R	I	T	I
U									A	E					O					O		S		
J	E	M	E	N	Ŝ	A	R	O	N	R					N	I	P	O	N	N			S	

P	A	N	A	M	H	O	N	Ŝ	U	Ĵ	U	R	A	S	V	A	L	E	T
A				A	A				G	A					A				U
F	E	R	A	R	V				A	B				A	L			R	
O				O	A				N	A				E	E			K	
S				K	N				D	T				Z	A	M	B	I	

Kompreneble ĝi ne estas la unika solvo. Venis multaj saĝaj solvoj, kiaj Danub, Delft, Nepal, Napol, Namur, Haiti, Havaj, Hanoj... Shen Guangmeng skribis Friul kaj Malaj. Tiuj solvoj ellasis la finaĵon "o", kaj aliaj ne, ekz. Orano, Cipro, Danio, Usono kaj Rusio, kiujn skribis s-ano Clary Francoise.

Ni petas viajn kontribuojn pri amuzaj ludoj kaj enigmoj.

La Red.

(Daŭrigo de p. 24)

estas ne nur metiisto, sed ankaŭ artisto. Post longtempa praktikado la 5 fratoj jam fariĝis lertuloj pri kaligrafio, pentrado, gravuro kaj aprezo de antikvaĵoj. Jia Wenzhong iam riparigis 9 grandajn tabulojn kun surskriboj de imperiestroj de Qing-dinastio por la Templo de Konfuceo de Pekino. Post multaj jaroj iuj ideogramoj sur la tabuloj jam malaperis kaj oni bezonis aldoni la mankantajn ideogramojn. Jia Wenzhong ne trovis grandan taŭgan skribilon. Li uzis pecon da ŝtofo kiel skribilon kaj perfektigis la surskribojn. "Ĝis nun neniu scias, kiu ideogramo ne estis skribita de imperiestroj." li diris.

Certe riparado estas signifoplena laboro. En 1982 venis informo ke oni malkovris du bronzajn ĉarojn ĉe la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio. Iu homo, kiu laboris ĉe la maŭzoleo, diris ke antaŭ riparado la ĉaroj aĉe aspektis kaj

post riparado ili bele rebrilas. Nur tiam oni ek-konis la valoron de riparado. Financa problemo ofte ĝenas tiun laboron, kaj la salajro de riparistoj estas nealta. Tamen tio ne povas malfortigi la amon de la familio de Jia Yubo al la laboro. La patro kaj liaj 5 filoj, kiuj laboras en la sama kampo, malofte renkontiĝas. Iam al loko, kie oni malkovris antikvaĵojn, ili estis samtempe invititaj. Antaŭ kelkaj jaroj en tombo de la Okcidenta Zhou-dinastio en Sanmenxia, Henan-provinco, oni malkovris multajn bronzaĵojn. Post ilia riparado tiuj difektaĵoj radias originan brilon. Ĉi-foje ili riparigis preskaŭ 100 objektojn. Ili estis tiel okupitaj ke ili ne havis tempon por babili. En la lastaj jaroj s-ro Jia malsaniĝis kaj emeritiĝis. Liaj filoj vizitas lin laŭeble, kaj antikvaĵoj estas ilia parol-temo. Tio, kion kontentigas la patron, estas ke la filoj eldonis librojn pri riparado de antikvaĵoj, kaj la arto ne malaperos. ■

Flora sezono en Kunming

KUNMING estas “printempa urbo” en la vera senco. Ĝi situas en sudokcidenta Ĉinio kaj estas ĉefurbo de Yunnan-provinco. Multaj ŝatas Kunming ne nur pro ĝia milda klimato, sed ankaŭ pro ĝia pitoreska pejzaĝo.

Nun oni havas novan impreson pri Kunming — floroj.

BUNTA FLORO-BAZARO

La floro-bazaro de Dounan-vilaĝo troviĝas 40 km oriente de Kunming.

Je la 6-a horo matene, sur la vojo de la gubernia urbo al la vilaĝo iras homoj du-triope. Ili plejparte vekte portas florojn. Knabinoj portas bambuan korbon surdorse. Aliaj kondukas sian kamioneton. Ĉiuj havas komunan celon — la floro-bazaro de Dounan-vilaĝo.

La floro-bazaro havas areon de 2/3 de piedpilka ludkampo. Jen maro de floroj: ruĝa rozo, flava lekanteto, purpura gladiolo... En la trairejo svarmas homoj. Junaj vendantoj laŭte vokas klientojn. Nejunaj virinoj ĉiam klopodas por altigi la prezojn. Knabinoj silente staras ĉe siaj floroj. Kiam iu venas rigardi, ili milde diras: “Jen tre freŝaj, ĵus plukitaj.”

En Dounan-vilaĝo oni kulturis nur grenon. Pro taŭgaj klimato kaj grundo, antaŭ pli ol 100 jaroj, la lokanoj ekkulturis legomojn anstataŭ greno. Iliaj legomoj estis tre famaj en Kunming. Antaŭ 10 jaroj ili ekkulturis florojn.

Tiam rapide progresis la ĉina ekonomio. La vilaĝanoj in-



Li Zhenghong en sia florkultivejo

formiĝis, ke freŝaj floroj estas multe bezonataj. Tamen, en la Novjara Tago, Printempa Festo kaj Tago de Geamantoj estas vintra frosto, kaj mankas floroj. Tial iuj junuloj ekkulturis florojn. Iliaj floroj el forcejo tre plaĉas al la floro-komercistoj de diversaj lokoj, precipe de norda Ĉinio. Ĉar vintre en la nordo malmulte kreskas floroj. Pli multaj Dounan-anoj entreprenis flor-kulturadon. Ili kulturis iom da legomoj nur por mem manĝi kaj pli da floroj por vendi.

Estas multaj flor-vendejoj sur la strato apud la bazaro. Aviadaj kompanioj luas domojn ĉe la strato. Ene estas stakoj da kartonaj kestoj. Ĉiumatene, freŝaj floroj estas metitaj en la kestojn kaj transportataj al aliaj lokoj. En iuj butikoj vendiĝas diversaj ujoj por floroj, aŭ grandaj kiel tamburego, aŭ delikataj kun longa kolo.

La vendistoj pakas la florojn per belaj paperoj por la klientoj.

ORDINARA FLORO-KULTURANTO

La 57-jara Li Zhenghong estas Dounan-vilaĝano. Li havas 6 infanojn. Liaj kvin filinoj jam edziniĝis. La vilaĝo sendis lian filon studi ekonomian administradon en universitato en Kunming, por ke li estonte servu al la vilaĝo.

Li Zhenghong ekkulturis florojn en 1994. En lia 0.13-hektara parcelo kreskas floroj de kvar specoj, kiujn li akvumas unu fojon semajne kaj sterkas unu fojon monate. La vilaĝanoj lernas unu de alia teknikojn pri senstamenigo kaj stikado. La flor-semoj parte estis bredataj de ili mem. Multaj Dounan-anoj kulturas ordinarajn florojn. Nur malmultaj kun sufiĉe da kapitalo kulturas va-

lorajn speciojn. Kiam ili havas problemojn, ili konsultas specialistojn de agronomia instituto.

La jara enspezo de Li Zhenghong estas 13 000 juanoj (8.3 juanoj = 1 usona dolaro). Por la 5 000 vilaĝanoj de Dounan, tio estas malpli alta ol la meza enspezo. Tiuj, kiuj pli frue entreprenis floro-kulturadon, havas pli grandan investon kaj profiton.

Januaro kaj februaro estas tempo por vendi. La vilaĝanoj estas tre okupitaj, ĉar tien venis flor-komercistoj de la tuta lando. Laŭdire, la prezoj en Dounan influas tiujn en Kantono, Ŝanhajo, Pekino, Tianjin kaj Tangu.

“Tiuj du monatoj estas plej gravaj por ni,” Li Zhenghong diris. “Iam mi devas akceli maturiĝon de la floroj, por ke ili floru pli frue; iam mi devas stuci ilin, por ke ili malfrue floru. La sola celo estas, ke ili surmerkatiĝu ĝustatempe kaj havu altan prezon.”

“Kvankam floro-kulturado estas profitodona, tamen tempo-raba. Mi devas tre frue iri al la bazaro, ĉar kiam la suno leviĝos, la floroj ne plu estos freŝaj,” li aldonis.

RENKONTIĜO JE LA NOMO DE FLOROJ

En la Tago de Geamantoj, sur stratoj de Kunming de tempo al tempo videblas junaj paroj, kaj knabinoj kun ruĝa rozo enmane. Antaŭ dek jaroj, tio estis tre mirinda. Kaj nun, multaj jam kutimiĝis. Ili eĉ sentas, ke la floroj donas novan guston al la urbo. Multaj Kunming-anoj ornamas sian vivon per floroj: kun floroj viziti amikojn kaj parencojn, gratuli novgeedzojn, beligi ĉambrojn...

En 1999 okazos en Kunming la Monda Ĝardenistika Ekspozicio. Parolante pri tio, la urbanoj sentas ĝojon kaj fieron. Tiam kolektiĝos amikoj kaj floroj de la tuta mondo. Kunming-anoj nun diligente laboras por la internacia renkontiĝo je la nomo de floroj.

Unua Internacia Konkurso “Verd-stela Pokalo” pri Infanaj Pentraĵoj kaj Fotografaĵoj

Por akceli la kulturan interŝanĝon kaj amikajn rilatojn inter ĉinaj kaj alilandaj infanoj kaj por konigi Esperanton al infanoj, la Ĉina Esperanto-Ligo, la redakcio de “El Popola Ĉinio” kaj la Ĉina Esperanto-Eldonejo kune lanĉas la Unuan Internacian Konkurson “Verd-stela Pokalo” pri Infanaj Pentraĵoj kaj Fotografaĵoj.

Aĝolimo: Ĉiuj, kiuj naskiĝis inter 1986-01-01 kaj 1994-12-31 (inkluzive), rajtas partopreni la konkurson. Ni dividos infanojn 4-6-jarajn en la grupon A kaj 7-13-jarajn en la grupon B.

Temo: Ĉiaj temoj imagoriĉaj kaj interesaj por infanoj

Formato: Fotografaĵo en formato de 175 mm x 125 mm, pentraĵo de ajna speco en ajna formato.

Limdato: Konkursaĵoj devas atingi la Ĉinan Esperanto-Ligon ĝis la 31-a de aŭgusto 1998.

Sendante konkursaĵon al la Ĉina Esperanto-Ligo (P.O. Kesto 825, CN-100037, Beijing, Ĉinio), bonvolu indiki sur la koverto “Konkurso” kaj la naskiĝdaton alipapere.

Premioj: Ni aljuĝos la unuan, duan, trian premiojn kaj honoran mencion respektive por pentraĵoj kaj fotografaĵoj.

“El Popola Ĉinio” raportos pri la konkurso kaj aperigos parton de la premiitaĵoj, kaj la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonos albumon de plej bonaj premiitaĵoj.

Cetere, ni disdonos la premiojn dum la 84-a UK en Berlino, 1999.

Kunlaboro petata

La Hangzhou-a Komerca Kompanio “Esperanto-Mar” volas kunlabori kun ĉiuj E-organizo kaj esperantistoj pri komerca traktado, varo-perado, poŝta aĉetado kaj interŝanĝo de varoj.

Adreso: Direktoro Qiu Xirong, Jiefang Lu 24, Hangzhou CN-310009, Zhejiang, Ĉinio

Telefono: +86-571-7071705

Telefakso: +86-571-7035995

Sanprotekto en somero

EN la sunbrila, varma somero tre viglas la vitala energio *jang* kaj konkure eliĝas el la homa korpo, dum la vitala energio *jin*, kaŝiĝanta interne de ĝi, estas ne sufiĉa. Pro manko de la vitala energio en la visceroj, la homa digestado malfortiĝas. Tial por malpliigi varmon interne de la korpo oni devas preni manĝaĵojn, utilajn al la lieno, stomako kaj produktado de la vitala energio. Por kvietigi soifon kaj rezisti kontraŭ sunfrapo oni devas manĝi akvomelonon, supun kun kuiritaj fazeoloj kaj kaĉon el rizo kaj lotussemoj. Somere oni devas preni ĉefe vegetalajn manĝaĵojn, sed malpli da viando, alie kaŭziĝos mukaĵo, kiu malutilas al *ĝinglŭo*-vojoj, cirkulado de la sango kaj vitala energio, kaj eĉ kaŭziĝos cerbaj kaj kardiovaskulaj malsanoj. Somere oni devas trinki pli da akvo, tamen oni ne devas trinki tro rapide, nek tro multe, nek tro da malvarma trinkaĵo, kiu povas ne nur maldensigi la stomakan sukcon, sed ankaŭ malhelpi digestadon kaj mallevi rezistopovon kontraŭ la malsanoj, kaj granda kvanto da malvarma trinkaĵo povas malpliigi sangon en la membranoj de la digestaj kanaloj, kaŭzi akutan gastroenteriton, disenterion k.a. Fakte en la medio de alta temperaturo varma trinkaĵo estas utila al ŝvitado, disiĝo de varmo en la visceroj kaj post trinkado oni sentas sin komforte. Kvankam malvarmaj trinkaĵoj, precipe la glaciigitaj, povas forporti kvanton da

varmo en la korpo, tamen la abrupta ŝanĝiĝo de varmo tre facile kaŭzas perturbon de ekvilibro en la korpo kaj malpli ŝvitigas. Kvankam oni sentas sin komforte, tamen la varmo disiĝas ne multe.

Somere la tago estas longa kaj nokto mallonga. Pro matena malvarmeto iuj ellitiĝas malfrue. Laŭ ĉin-medicina teorio, somere oni devas enlitiĝi kaj ellitiĝi frue konforme al la natura ŝanĝiĝo "La suno leviĝas frue". Se matene oni eldomiĝas frue kaj faras malrapidan kuradon, gimnastikon k.a., tio estas tre utila al la homa sano.

Klasikaj medicinaj libroj de Ĉinio konigas, ke somere oni ne devas longe resti sub ombroriĉaj arboj nek sur balkono kaj en dormo oni ne devas lasi malvarman aeron longe blovi el klimatizilo, por ke ĝi ne enpenetriĝu en la homan korpon, ĉar dum ripozo en la malvarmeta loko, kvankam la temperaturo de la haŭto malleviĝas, tamen la natura temperaturo restas senŝanĝa, kaj pro manko de ŝvito la interna varmo ne povas disiĝi, tial oni ofte sentas kapturton, lacon, malfortecon de la membroj k.a. Kaj pro tio oni facile suferas de malvarmumo, vomado, lakso kaj eĉ apopleksio.

Laŭ la teorio pri sanprotektado, la ĉinaj medicinistoj opinias, ke la interna varmo havas striktan rilaton kun la funkcio de la homa koro. Pri tio respondecas ne nur la koro, sed ankaŭ la cerba kortekso kaj eĉ la centraj nervaj sistemoj en la tuto. Tial tre grava estas protektado de la homa koro


en somero.

Oni devas agi laŭ la natura leĝo en somero por sin teni en konstanta bonhumoro. Se oni estas en konstanta malĝojo kaj depresio, do kaŭziĝas perturbo de la sanga cirkulado kaj eĉ kormalsano. La koro regas internan varmon ŝvitigan. En varma somero oni facile ŝvitas kaj laciĝas. Longa restado en varma loko aŭ sub la suno povas kaŭzi sunfrapon. Tio malutilas ankaŭ al la funkcio de la koro, tial atakite de sunfrapo, oni suferas ankaŭ de subita Brustangoro kaj sveno. Tiuj, kiuj suferas de hipertensio, kormalsano aŭ aterosklerozo, devas doni pli grandan atenton al prevento de sunfrapo.

En la fino de somero kaj komenco de aŭtuno la klimato estas humida. Ankaŭ humideco estas patogena faktoro. La homa lieno inklinas al sekeco, kaj se la patogena faktoro atakas la lienon, tio malhelpas ne nur la lienan funkcion, sed ankaŭ la apetiton kaj kaŭzas dispepsion, abdomenan ŝveliĝon, lakson kaj lacon kaj kun la tempopaso okazas muskola reduktiĝo, depresio k.a. Por eviti tiajn simptomojn oni devas sin deteni de ĉagreno kaj kolero, regule aranĝi la ĉiutagan vivon, trinki teon kaj ofte preni kaĉon.

Somero estas sezono, en kiu ofte okazas infektaj intestaj malsanoj. Tiam oni devas doni grandan atenton al prevento de bakteria disenterio kaj por preventi la malsanon oni devas manĝi pli da ajloj kaj malpli da malvarmaj manĝaĵoj. ■

Blu-porcelana kruĉo kun flora desegno



La ĉinaj porcelanaĵoj estas mondfamaj pro siaj beleco kaj praktika uzo. La gravaj specoj estas tiuj de blua, blanka kaj bunta koloroj.

Bluan porcelanaĵon oni nomas ankaŭ porcelanaĵo blu-desegna aŭ blu-glazurita. La metiistoj unue farbas desegnon sur la korpo per kobalto kaj poste tegas ĝin per travedebla glazuro. Post bakado en alt-temperatura fajro la korpo iĝas bela porcelanaĵo kun blua koloro. Oni uzas ĝin kiel ujon, manĝilon kaj florvazon. La blua porcelanaĵo, kun koloro stabila, desegno brila kaj klara el liberaj-kaj fluaj strekoj, donas elegantecon kaj havas valoron de arto.

Laŭdire, la blua porcelanaĵo aperis antaŭ 1 200 jaroj — en Song-dinastio. El la porcelanaĵoj de Ĉinio, la blua porcelanaĵo havas plej longan historion kaj plej grandan produktokvanton.

La du-orela kruĉo kun flora desegno altas 46 cm. Ĝi estis farita en Ming-dinastio (1368-1644) en la fama porcelana urbo Jingdezhen.



"Kolorludo"
de **AIRA RÖNTYNE**
(Finlando)



Sunfloroj
de **MARIA T. C.**
RIJPERT
(Nederlando)

ISSN 0032-4361

